

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Esperanto
havas domon
en Bruselo**

**Kalendaro
1998**

**16-a Influo:
110 jaroj da
Esperanto =
2 minutoj
en CNN**



Afriko en siaj propraj manoj

Vi trovos...

41 Malferme UEA 90-jara

42 EN AFRIKO ESPERANTO VALORAS PLI

Intervjuo kun R.K.
Hounnake kaj H. Bakker

*"Esperantujo havas
komunajn trajtojn
kun la afrika socio."*



44 Eŭropo

BRUSELA ESPERANTO- CENTRO INAŬGURITA

Jorgo De Mulder

*De la 17-a de januaro
la ĉefurbo de Eŭropo
gastigas plian
ambasadon.*

45 KONGRESA KOMUNIKO 2

83-a UK Montpeliero: Adresoj,
alveturo, programo, aliĝoj, kotizoj

46 Kampanjo 2000

Decidu vi kion UEA faru!

Renato Corsetti

47 Influo n-ro 16 ESPERANTO VALORAS 2 MINUTOJN EN CNN



PERSEKUTOJ KAJ KOMUNIKADO

51 KALENDARO

*Kaj ni en Roterdamo invitas al
Malferma Tago okaze de la
90-jariĝo de UEA!*

55 Laste aperis

*Monato de reaperoj: La bona lingvo
de Piron, Cezaro de Jeluŝiĉ kaj La
nova realismo de Vogelmann. Kaj
freŝe: La senĉesa rakonto de Ende.*

56 Libroservo

Monumenta ĉampiono

Vendostatistiko kun komentoj

Osmo Buller

Kaj plue...

57 FOLIUME

La kovrilo: Brikon post
briko, la afrika movado
konstruas sin.

58 FAKE

59 LOKE OFICIALA INFORMILO

Malferme: Akvofaloj de
Igvasuo, Argentino/
Brazilo. Bildo kompleze
de Foztur – Turisma
Oficejo de Foz do Iguaçu

60 ANONCETOJ NEKROLOGOJ

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp);
petu informojn de via landa asocio
aŭ de la CO (adreso ĉi-sekve). Unuopa
ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifoj (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150,
1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera
kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja
ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436 1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zapelli.



UEA 90-JARA

La Universala Esperanto-Asocio celas la plifaciligon de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreon de fortika ligilo de solidareco inter samideanoj. La unuan celon ĝi atingos iom-post-iom per la starigo de la diversspecaj internaciaj servoj, kiujn ebligas tuj de nun la disvastiĝo de nia lingvo. La dua parto de la programo montras, ke nia Asocio estas gvidata ne nur de pure materialaj interesoj kaj komercaj celoj: grupigante ĉiulokajn homojn en unu tute neŭtrala organizaĵo, plimultigante la servojn, kiujn al si reciproke povas fari tiuj homoj, faciligante iliajn kreskantajn rilatojn internaciajn, donante al ili la eblecon sin ne nur reciproke komprenadi, sed ankaŭ *utiladi*, ĝi vole-nevole plifortikigos kaj plirealigos ilian solidarecon kaj kreos inter ili ligilon tiom pli nerompeblan, ke ĝi havos materialan fundamenton.

[...] La Universala Esperanto-Asocio [...] konsideras la lingvon kiel jam ekzistantan interkomunikilon, apartenantan al ĉiuj homoj, kiuj ĝin uzas, kaj sekve ne perforte tuŝeblan de iu ajn aŭtoritato; ĉiujn teoriajn lingvajn diskutojn ĝi konsideras kiel ekster sia celo. Fine, la neŭtraleco de la Asocio rilate al politiko, religio kaj nacieco estas principo, pri kies neceseco ni ne bezonas insisti. [...]

Kun tiu programo ni turnas nin al la jam vasta popolo esperantista, al ĉiuj samideanoj, kiuj deziras eliri el la vojo de vana diskutado kaj pura predikado por eniri en la vojon de la efektiva uzado kaj valorigo de Esperanto kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj; al ĉiuj, kiuj volas *labori*, ni turnas nin kun la espero, ke nia alvoko estos aŭdita. Ne mankas la laborantoj en la esperanta rondo, multenombraj estas la bonvoluloj, sed ili ĝis nun [ne] estis sufiĉe utiligataj. Pro manko de forta ligilo kaj taŭga internacia organizaĵo, kiun postulas la nunaj bezonoj de nia movado, multaj individuaj klopodoj estis perditaj kaj multaj laŭdindaj entreprenoj mortis, ĉar ili ne estis sufiĉe konitaj kaj helpitaj. Dank' al la nova organizaĵo, ĉiu povos labori pri speciala fako, kun la certeco, ke lia laboro estos ne vana penado, sed valora kunhelpo al la granda klopodado de miloj da aliaj homoj. La plej humila batalanto, la plej nekonata soldato povos fosi sian propran sulkon, sed el la sulkaro metode fosita de ĉiuj unuigitaj laboristoj baldaŭ kreskos garbo de neantaŭvidita graveco, kaj la Esperantistaro, kiu nuntempe pro sia nesufiĉa unueco estas ankoraŭ negranda rondo sur la vasta tero, pli kaj pli potenciĝos kaj per la faktoj kaj la vivo mem, sen alia levilo ol la konsenta kaj orda laboro de siaj anoj, sin trudos al la tuta mondo, kaj fariĝos atentinda faktoro en la plivastiĝo de la vivo internacia.

Hector Hodler (Esperanto, 1 majo 1908)

En Afriko Esperanto

La volontuloj de UEA laboras ja volonte — kiel indikas ilia nomo —, sed vi, Raoul, diligentis eĉ en semajnfinoj, farante laborvizitojn al Hans.

Raoul K. Hounnake: Mia kandidatigo kiel volontulo, antaŭ unu jaro, koincidis kun la deziro de Hans Bakker reipensi la praktikon de la afrika agado, antaŭvide al sia iom-post-ioma retiriĝo. Tial ni profitis mian restad-tempon por detalaj preparoj. Ni havas komunan bazan ideon: la afrika agado estu en la manoj de afrikanoj, aŭ — por diri iom burokrate — la administrantoj situu proksime al la administratoj. Togolando estas la movade plej forta lando de Afriko, estus do konvene ke tie ni transprenu taskojn de la afrika agado ĝis nun faritajn en Eŭropo.

Ĉu tio signifas, Hans, ke ni preparigu al ia “epoko post Hans Bakker” en la afrika agado?

Hans Bakker: Mi ne opinias ke mia nomo sola taŭgas kiel difinilo de movada epoko. Ja ĉiam mi strebis havi kunlaborantojn en la tuta mondo, kaj mi devas menci, interalie, la ege kunlaboremajn eŭropaninojn Anita Dagmarsdottir, Helga Farukuoye, Kate Hall, Henny Jacques, Odette Scheidel kaj Elisabeth Schwarzer. Sed mi devas konstati ke la rondeto de kunlaborantoj nun ne plivastiĝas. Jen plia instigo por pli da memstareco ĉe la afrikaj movadanoj!

Mi starigos la neevitindan demandon: ĉu Esperanto estas vere bezonata en Afriko?

RH: Persone, Esperanto forprenis de mi multon — tempon, energion —, sed, ĉefe, ĝi donis al mi multon. Ne monon, sed multajn reciprokajn kontaktojn homajn, kiuj aparte utilis al mi, ĉar universitate mi studis juron kaj diplomiĝis pri internaciaj rilatoj. En tiu kampo Esperanto multe larĝigas la horizonton!


Mi eklernis la lingvon en 1988, sed enmovadiĝis nur en 1990. Kelkajn jarojn poste mi eĉ fariĝis ĝenerala sekretario de Unuiĝo Togolanda por Esperanto.

De kie venas via emo ne nur larĝigi vian horizonton per Esperanto, sed ankaŭ movade kontribui al ĝi?

RH: Mi sentas en mi fortan ligan kun Esperanto kaj kun homoj ene de Esperantujo. Mi ankaŭ trovas en Esperantujo komunan trajton kun la afrika socio: en ambaŭ la anoj povas ĉiam havi la senton esti prizorgataj, sperti la solidarecon de sam-komunumanoj.

Sed, revene al la ĉefa demando, mi povas atesti ke multajn afrikanojn ĝenas kiam oni parolas pri “afrikaj profitebuloj”, pri “rizesperantistoj” kaj simile, pridubante iliajn motivojn de esperantisteco. Sed estas simple: ĉie en la mondo logiĝas al Esperanto samaj kategorioj de homoj, pro similaj motivoj.

HB: La argumento ke “Esperanto ne estas bezonata en Afriko”, aŭ eĉ ke “Esperanto ne povas normale funkcii en Afriko” similas al la gurmaĵo de niaj kontraŭuloj: “Esperanto ne povas funkcii”. La faktoj dementas ambaŭ asertojn. Oni ofte supozas ke homoj zorgas pri siaj intelektaj bezonoj nur lastavice, post kontentigo de siaj



Partoprenantoj de la
Tria Afrika Kongreso (Winneba, Ganao, 1994/95)

bezonoj fizikaj. Sed la praktiko montras ke eĉ homoj en rifuĝejo, sen medikamentoj kaj sen deca loĝloko, tamen okupiĝas pri Esperanto. Kiu do rajtus rifuzi tion al ili?

Ni aŭdis kion donis Esperanto al Raoul. Sed kion donis Afriko al vi, Hans, kiu eĉ neniam vizitis tiun kontinenton?

HB: En mia junaĝo, kiam mi aktivis en la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO (kun homoj kiel ekz. Renato Corsetti

Helpi: jes, sed kiel?

Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato estas organizo kiu helpas malsatantojn tutmonde per konkretaj projektoj (kiel sugestas ĝia emblemo, dekstre). Ĝi eldonas sian kvaronjaran bultenon *Monda Solidareco* (Les Nids, FR-49190 St-Aubin-de-Luigné, Francio; ☎+33/2/41-78-47-75; ✉dan.cdm@wanadoo.fr) en la oficialaj lingvoj franca, hispana kaj Esperanto. “Komence simbola, la uzado de Esperanto en Monda Fonduso fariĝas pli kaj pli labora, ĉar nun atingas la Administran Konsilantaron pli kaj pli multaj projektoj kaj helpopetoj skribitaj en la internacia lingvo” — ni legas en n-ro 58 (dec. 1997) de *Monda Solidareco*. El la sama



valoras pli



Foto komplezo de Ogiyne Prince-Henrik

Dum liaj du monatoj kiel volontulo en la Centra Oficejo, ni pridemandis la 27-jaran Raoul K. Hounnake el Togolando. Ni sidigis apud lin la veteranan nederlandan UEA-komisiiton pri afrika agado, Hans Bakker.



Foto: François Vauthier

Raoul K. Hounnake

kaj Jeanne-Marie Cash), mi klopodis agi por defendi la rajtojn de klaso, de minoritato, de individuo... Post mia eksjunuliĝo mi trovis natura daŭrigi tian agadon pri Afriko, loko kie la koloniismo postlasis profundajn spurojn. Riĉigis min novaj amikecoj, kaj ĉefe la sento ke mi pli utilas al nia movado ol se

mi agus nur en Eŭropo. Nome, mi konvinkigis ke Esperanto en Afriko havas pli da valoro: landoj sen evoluinta komunik-sistemo pli bezonas Esperanton! En Nederlando oni jam devas defendi sin kontraŭ tro da informoj: ju pli da komunikiloj, des malpli da komunikado. En evoluintaj landoj la intereso pri Esperanto baziĝas ne plu sur ĝenerala emo komuniki sed sur la pli specifa emo trovi idealistojn trans la limoj.

Ĉu viaj surlokaj spertoj, Raoul, konfirmas tion? Kial oni esperantistiĝas en Afriko?

RH: Unue, Esperanto donas eblon informiĝi preter la amaskomunikiloj, ofte manipolataj. Kaj, ĉefe, oni fariĝas esperantisto por disvolvi siajn diversajn emojn. Nu, iuj ja forlasas la movadon kiam iliaj deziroj kontentiĝis, sed aliaj restas eĉ malgraŭ neplenumiĝo de deziroj.

HB: Ĉiel ajn, oni ne pensu ke afrikaj esperantistoj sidas senfare, kun manoj etenditaj por ricevi monon! Ili eĉ havas agad-formojn neimageblajn en Eŭropo...

RH: ...kiel la futbalteamo kiun ni starigis, kaj kiu, malgraŭ nebrilaj plenumoj sur la ludokampo, allogas homojn esperantumi. Sed, vere, nian agadon baregas kelkaj neforigeblaj problemoj: la aĉa infrastrukturo, la izoliteco kaj la manko de movada kunlaboro inter afrikaj landoj pro la malfacileco de kontaktoj, la nekapablo de la movado finance subteni sin...

HB: La monda ekonomio ne permesas mem-starecon al la afrikanoj. Kun pli da subteno, nia movado florus en pli da landoj. Sed pro manko de rimedoj, oni ofte devas eĉ bremsi agadojn anstataŭ instigi ilin!

Do, kial ĝuste Togolando escepte sukcesas movade?

RH: Pro nenio alia ol la sindediĉo de iuj personoj, por kiuj Esperanto estas multe pli ol hobia. Seriozajn instruistojn ni havas, kaj homojn kun klaraj ideoj pri la farendaĵoj. En Togolando la estraranoj de la landa asocio sincere konsideras sin servistoj de la movadanoj. Sed mi ne laŭdu nin mem, ĉar, kiel oni diras ĉe ni: kiam oni dancas, nur de ekstere videblas ĉu oni bone dancas! ★

fonto ni citas leteron de Sabine Darbellay (Germanio), kiu kontribuas al debato en la bulteno pri "konfuzo inter Esperanto, solidareco kaj helpemo": Ĉu kaj kiel reagi al leteroj Esperantlingvaj (ĉi-kaze: de afrikanoj) kiuj petas helpon de diversaj specoj?

Laŭ mi, ĉiu unuopa homo devas mem decidi ĉu helpi aŭ ne. Mi kutime provas, minimume ion, simbole. Grave estas, laŭ mi, ĉiam respondi leterojn, klarigi kial oni ne povas aŭ (en kazo de idiotaj postuloj) ne volas helpi, iomete rakonti pri la propra situacio, pri la realeco en Eŭropo, ankaŭ pri la realeco de la Esperanto-movado tie ĉi. Trompisto kaj ruzuloj verŝajne ne kredas la enhavon de tiaj leteroj — sed al seriozaj homoj responda letero montras ke almenaŭ ni ne simple ignoras iliajn petojn aŭ problemojn.

Laŭ miaj spertoj el dek petoj unu estas serioza, la aliaj venas de homoj kiuj simple vidas en Esperanto eblon profiti materie. Multaj simple provas kapti la okazon iom plibonigi sian mizeran vivon... kaj trompi mire riĉegan eŭropanon ja ne estas krimo, ĉar ne gravas ĉu tiu havas kelkmil dolarojn pli aŭ malpli. Tiajn malgrandajn trompulojn mi ne kondamnas, eĉ iel komprenas, kvankam ili tendas min. Ili havas nenian ideon pri la realo ĉe ni. Krome tro multaj kredigas al ili ke Esperanto povas alporti materie pli bonan vivon... do, ne mirige ke ili provas. Supozeble indas elteni kelkajn trompojn por jen kaj jen trafi veran helpendulon. Aliflanke helpante endas substreki ke Esperanto ne estas bonfara organizaĵo, sed lingvo. Laŭ mi pripensendas ke unu ricevinto de 20 dolaroj verŝajne kreas plurajn samideanojn kiuj eklernas Esperanton nur ĉar ankaŭ ili ŝatas dolarojn.

Brusela E-Centro inaŭgurita

"De 17 jan. la ĉefurbo de Eŭropo havas plian ambasadon" — tiel povus teksti enkonduko por gazetara informo pri la inaŭguro de Esperanto-centro en Bruselo, ĉefurbo ne nur de Belgio.

Efektive, la teretaĝaj salonoj, en kiuj estis festita la ĝojinda evento, elradias ian prestiĝon per siaj kvin metrojn alta plafono kaj marmoraj kamenoj: kvazaŭ montrofenestro inda por uzo en la kampo de niaj eksteraj rilatoj. En tiu agrabla loko, en bona etoso tostis la 17-an de januaro okdedo da samideanoj al prospero de la nova iniciato, kaj kvindekopo restis plu por festa vespermanĝo kun Esperanto-vino.

La kvinetaĝan domon — kiu situas urbocentre, sur la lastatempe tute rebeliegita bulvaro Leopold II — aĉetis en 1993 profunde idealisma esperantisto Brusela, André Mertens Goossens. (Vd. feb. '94, p. 36. —Red.) Post venko de aro da malfacilaĵoj dum la kompleta renovigado, fine de oktobro 1997 — dato pli-malpli koincida kun la centjariĝo de Esperanto en Belgio — la teretaĝo de la domo fariĝis loĝebla. Troviĝis du gejunuloj (Nataŝa kaj Jorgo De Mulder) kiuj pretis ekloĝi en la apartamento fone de la teretaĝo, kun la celo organizi la centron.

La supraj tri etaĝoj konsistigas tri komfortajn apartamentojn, kiujn espereble luprenos esperantistoj. La teretaĝo kaj kelo formas la E-domon



La Brusela Esperanto-domo, konstruita en 1905

mem, kun ideala laborspaco en la kelo, kiu povas servi ekz. kiel kursejo, biblioteko kaj laborkunvenejo. Trovi-

ĝas ankaŭ kuirejo, uzebla dum festoj.

Dum kaj post la inaŭguro ni ricevis multajn kuraĝigojn de simpatiantoj kaj samideanoj. Dank' al ili kaj per la daŭra grava subteno de A. Mertens

Goossens kaj lia familio, ni tratabas nin tra la problemoj de la komenco. Pro la unu-anima granda entuziasmo, la inaŭguro donis al ni multe da memfido. Aparte danke-maj ni estas pro la subteno de Esperantista Brusela Grupo, kun kiu ni deziras harmonie kunlabori en la klopodoj por sama celo.

Ŝancoj en interkulturema metropolo

Jam ekagadis la Esperanto-centro, en parto de Bruselo ĝis nun "virga" el la vidpunkto de nia informlaboro. Post la apero de du tre pozitivaj artikoloj en ĵurnaloj franclingvaj kaj interesiĝo de la loka televidstacio, jam ekvenas reagoj de lokanoj. Se troviĝos sufiĉe da interesatoj, ni povos lanĉi elementan kurson.

Dua grava afero, rilata al la financado de la centro, estas organizi la ludonadon de la luksaj salonoj al aliaj sociaj

kaj kulturaj organizaĵoj. Tio konduku al subteno fare de neesperantistaj asocioj (foje monhavaj) al asocioj Esperantaj (kutime senmonaj). Por eviti tiklajn situaciojn koncerne impostojn, la 14-an de februaro estis subskribita kontrakto, per kiu Belga Esperanto-Federacio fariĝis la ĉefluanto.

Tria ideo koncernas organizadon de kulturaj vesperoj por esperantistoj: programoj kiuj povas aloji ekz. gastronomion kaj literaturon. Pro la internacieco kaj interkulturemo de Bruselaj esperantistoj ekzistas ŝanco je sukceso por tia evento, unufoja monate.

Esperantistojn kiuj travojaĝas Bruselon ni ĉiam kore bonvenigas, aparte por pli-internaciigi tian vesperon aŭ eĉ kontribui al ĝi prelege aŭ artisme — kion ni povas kompensi almenaŭ per senpaga tranokto. Kontakto: Brusela E-Centro, bd. Leopold II 176, BE-1080 Brussel, Belgio; ☎/☎+32/2/411-71-75; ✉jorgo@agoranet.be.

Jorgo De Mulder (BEC)

15 kandidatiĝis por B-komitataneco

La individuaj membroj povos elekti siajn ok reprezentantojn en la Komitato de UEA por la periodo 1998-2001 el inter 15 kandidatoj el 14 landoj. Tiom da validaj kandidatiĝoj atingis la Centran Oficejon ĝis la limdato, la 15-a de februaro. Unu kandidateco forfalis, ĉar ne sufiĉis la nombro de subtenantoj (necesas minimume 10 el 3 landoj) kaj mankis konsento de la proponito mem.

En la antaŭaj elektoj (1995) estis 11 kandidatoj. Jen unu el la unuaj fruktoj de Kampanjo 2000, kiu celas plivigliĝon de nia agado sur ĉiuj niveloj! La kandidatoj estas:

Augusto **Casquero de la Cruz** (Hispanio)

Petro **Chrdle** (Ĉeĥio)

Christian **Darbellay** (Germanio)

Katinjo **Fetes-Tosegi** (Aŭstrio)

Aleksander **Korjenkov** (Ruslando)

LEE Chong-Yeong (Korea Respubliko)

Antonio **Leoni de León** (Kostariko)

Alicja **Lewanderska-Quednau** (Germanio)

Michela **Lipari** (Italio)

Atilio **Orellana Rojas** (Argentino)

Andrzej **Pettyn** (Pollando)

Potturu V. **Ranganayakulu** (Hinda Unio)

Amri **Wandel** (Israelo)

Wu Guojiang (Ĉinio)

YAMASAKI Seikô (Japanio)

La CO dissendos la voĉdonilojn al la individuaj membroj post la registro de plejparto de la ĉi-jaraj kotizoj, verŝajne fine de aprilo.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

83-a Universala Kongreso de Esperanto

Montpeliero (Francio)
1-8 aŭgusto 1998

La akvedukto
super Gard,
celo de unu el
la kongresaj
ekskursoj

Adresoj

Konstanta: CO de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. **Adreso de LKK:** 83-a UK de Esperanto, 7 rue Gustave, FR-34000 Montpellier, Francio.

Dua Bulteno

Kun abundo da loĝebloj por ĉies buĝeto, du antaŭ- kaj tri postkongresoj, dudeko da ekskursoj, la Dua Bulteno estis dissendita al ĉiuj aliĝintaj kongresanoj, kun mendilo. Ĝi konsultebas ankaŭ ĉe la hejmpaĝo de la UK (vd. sub "TutTera Teksaĝo"). Bv. mendi kiel eble plej baldaŭ por certigi rapidan rezervon de ĉio dezirata.

Alveturo

Komence de aŭgusto, kaj precipe la 1-an de aŭg., regas en Francio la plej granda trafikpremo de la tuta jaro. Tial necesegas rezervi enlandajn flugojn kaj aliajn biletojn tre frue. Por akiri specialan rabaton de 20% el la plena tarifo por ĉiuj trajnvojaĝoj en Francio (1-a kaj 2-a klaso, ir-revena vojaĝo kun la kongresaj datoj inkluzivitaj), kongresanoj povas mendi rabatkuponon ĉe UEA (prezentendajn ĉe la biletaĉeto), kontraŭ pago de poŝtaj

kaj administraj kostoj de po 3,20 gld. (aŭ 2 int. respondkuponoj) por unu kupono. Eĉ pli favoraj rabatoj ekzistas por diversaj kategorioj: junuloj, paroj ktp — frue demandu vian bileton.

Junulara programo

Aparte riĉa programo disvolviĝos en kaj ekster la kongresejo, eĉ sur apudaj strandoj. Krom komforta amasloĝejo disponeblas diskoteko. Eblas mendi manĝojn kontraŭ tre favoraj tarifoj. Aliĝo ĉe la CO aŭ F. Durand: 13 rue Prof. Jean Garnier, FR-34070 Montpellier, Francio; ☐jefo@esperanto.org.

Infana Kongreseto

Atendas idealaj kondiĉoj en Sommières apud Montpeliero. Aliĝu ĉe Christopher Fettes, St Columba's College, Whitechurch, Dublin 16, Irlando; ☎+353/1/493-19-84; ☎493-66-55.

TutTera Teksaĝo

Post Adelajdo, ankaŭ Montpeliero alireblas elektronike el la tuta mondo: konstante funkcios interaga TTT-ejo. La UK-hejmpaĝo, funkcia jam de januaro, enhavas la Unuan kaj Duan Bultenojn kaj aliajn aktualaĵojn: <http://www.mygale.org/10/univkong/>.

Ĝustigoj

El la Dua Bulteno elfalis la priskribo de la lastaj du tagoj de la belega antaŭkongresa ekskurso al la Francaj Alpoj. La mankanta tekstero petebas de la CO. (La ekskurso finiĝos per veturo al Montpeliero.) Postkongreso P2, "La ĉarma Provenco", finiĝos la 14-an (ne la 15-an!) de aŭg. vespere en Avinjono: eblis same veturi plu al Montpeliero kiel ankaŭ tranokti en Avinjono.

Aliĝoj

Ĝis 20 feb. venis 2035 aliĝoj el 58 landoj: i.a. 530 el Francio, 153 el Germanio, 148 el Japanio, 146 el Pollando, 116 el Ruslando kaj 76 el Italio.

Handikapitoj kaj blinduloj rajtas aliĝi laŭ la kotizo de la unua kotizperiodo, sendepende de sia aliĝdato — laŭ estrara decido, sekve de sugestoj de Asocio de E-istaj Handikapuloj kaj Ligo Internacia de Blindaj E-istoj.

Kotizoj

Ĝis la fino de marto validas jena tarifo: individua membro de UEA (IM) 280 gldenoj (el B-kategoriaj landoj: 212 gld); ne-IM — 350 gld. (265); komitatano de UEA, kunulo, junulo mem IM 140 (106), ne-IM 212 (160).

UEA 90-jara!

MALFERMA TAGO EN LA CENTRA OFICEJO

sabaton la 25-an de aprilo 1998 (10h00 - 17h00)

★ Prelegoj pri tri granduloj de UEA:

Hector Hodler (Mark Fettes)
Edmond Privat (Ed Borsboom)
Ivo Lapenna (Ulrich Lins)

★ La tuta estraro de UEA ĉeestos

★ La libroservo rabatos ĉion je 10%!


- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Loterio
- ★ Kafo kaj teo senpagaj



BANKEDO je 100-metra alto en Euromast favore al Kampanjo 2000 (18h00). Prezo: 125gld.

Bv. antaŭmendi ĉe la CO antaŭ la 10-a de aprilo.

Se vi deziras tranokti en Roterdamo, la CO volonte peros por vi hotelĉambron.



Decidu vi kion UEA faru!

“UEA estas perfekta ekzemplo de neorganizita entuziasmo” — skribas motoro de Kampanjo 2000, R. Corsetti. “Ĉiuj faras kion ili volas, ĉar finfine ĉiuj pagas per siaj tempo kaj mono.”

En ĉi tiu senco, mi agnoskas tion, ĝi estas multe pli postmoderna postmoderna ol io organizata strukture kaj hierarĥie kiel la romia armeo aŭ kelkaj nunaj multnaciaj kompanioj. Eble pro tio estas multe pli komforte vivi en ĝi. Oni vekigas iun belan prin-tempan matenon kaj decidas ke la fina venko povos veni nur per esperantigo de norvegaj fajrobrigadistoj aŭ de nepalaj skoltoj. Kaj oni tuj ekagas, lanĉante senrezultajn alvokojn por ke ĉiuj helpu pri la novaj agadoj.

Tamen, de tempo al tempo, estas ankaŭ bele senti sin parto de pli vasta agado. Tiucele, interalie, estis lanĉita Kampanjo 2000.

Ĝi antaŭvidas esence tri agocelojn:

1 — altigi la nivelon de la movado kaj de la komunumo;

2 — altigi la prestiĝon de E-o per inform-kampanjoj al neesperantistoj;

3 — altigi nian influon en internaciaj medioj/organizaĵoj kiuj rekte aŭ ne-rekte okupiĝas pri lingvoj.

Ĉiu Esperanto-organizaĵo estas stariganta (se ĝi deziras) sian konkretan agad-planon. Tiun de UEA vi povas peti per simpla poŝtkarto de la CO.

La momento de la vero

Nun, tamen, venis la “momento de la vero”: ĉiu agado postulas monon.

Jam estas ricevitaĵoj dekmiloj da gldoj, sed entute necesas eble 300 000 gld. Se vi, individua membro aŭ eĉ ne membro, deziras kontribui per kiu ajn malgranda sumo, sendu tiun sumon al UEA kun la indiko “Konto 2000”.

Decidu samtempe kiel oni uzu la sumon kiun vi sendas. Se vi notos “por celo 1”, ĝi estos uzata por produkti

materialojn en Esperanto kiuj altigu la lingvan kaj organizan nivelon de la anoj de nia komunumo. (Mi reemfazas kion nia prezidanto jam diris: por ni ne ekzistas distingo inter movado kaj komunumo: ambaŭ ekzistas, kaj la movado estas ilo per kiu la komunumo atingas siajn celojn.) Se vi notos “por celo 2”, via mono helpas por produkti informilojn kaj anoncojn kaj por disvastigi ilin al neesperantistoj. Mono “por celo 3” estos uzata esence por subteni la agadon de niaj homoj ĉe UN, Eŭropa Unio, Unesko ktp.

Krome, vi povas ankaŭ noti “por la ĝenerala kaso de Kampanjo 2000”. En tiu kazo via mono estos uzata laŭ la bezono en la unuopaj momentoj.

Do, vi kiuj entuziasme reagis subskribante la Manifeston de Prago, same entuziasme respondu nun per malgranda konkreta helpo al “Konto 2000”, kaj krome ĝuu la senton por unu momento esti prezidanto de UEA kaj dikti al ĝi kion ĝi prefere faru. Tio eĉ ne estas tute ŝerca, ĉar el viaj indikoj oni ricevos ideon pri tio kiun el la tri celoj esperantistoj preferas, kaj sekve oni povos stiri la tutan agadon al la kampo kiu rikoltas pli da preferoj.

Renato Corsetti

Praga Manifesto

Ĝis redaktotino la nombro de subskriboj atingis

10 687.

Influo

Por plibonigi la fluon de informoj pri informado



Numero 16



Du aferoj ĉi-numere retenis mian atenton. Unue, la obliĝo de eroj pri retaj novaĵoj: mi antaŭvidas

konstantan kreskon de nia rubriko "Interreto". Cetere, preskaŭ neniom da informoj por Influo atingas min per ordinara poŝto, mia ĉefa fonto nuntempe — mi volonte agnoskas tion — estas individuaj retkomunikoj kaj eroj senditaj per la interredaktora informservo de László Szilvási.

Kaj, due, mia atento haltis ĉe paperaj E-informiloj. Mi memoras ke, antaŭ jaroj, oni donis al mi grekan informfolion, kiu ĝis nun ŝajnas al mi la plej bona propagandilo iam ajn vidita: kolorplena, kun mondomapo kaj citaĵoj de eminentuloj favoraj al Esperanto; tre impone, la preskostojn kunpagis la Nacia Banko de Grekio. Ĝuste nun ni en Britio intencas modernigi niajn foliojn, kaj mi tre ŝatus vidi broŝurojn/foliojn/propagandilojn de aliaj landaj asocioj. Tia komparo instruas ja multon. Do, se eble, mi petas la koncernatojn sendi al mia ĉisuba adreso siajn plej bonajn informilojn (ne ĉiujn ajn!), por ke mi raportu pri ili en Influo.

Geoffrey Greatrex

Interasocie, kun profesioj

Por la Unua Interasocia Seminario pri Informado (IASI) en Liono (Francio) kunvenis por la semajnfino de la 15-a kaj 16-a de novembro 32 reprezentantoj de trideko da regionaj, naciaj kaj internaciaj Esperanto-asocioj.

Post enkonduko de kunorganizanto Bruno Flochon (prezidanto de Junulara Esperantista Franca Organizo), Pascale Maisonneuve, profesorino pri komunikado laborinta kun gazetaraj agentejoj, klarigis la bazajn principojn por starigi strategion de komunikado. Ŝi ankaŭ donis komentariojn pri kelkaj informiloj kaj afiŝoj pri Esperanto — laŭ formo, ne laŭ enhavo. Sub la gvido de Corinne Marion, skizistino en vojaĝ-agentejo, la seminarianoj en kvinpersonaj grupoj kreis afiŝojn, kiuj estis poste enpaĝigitaj kun la helpo de Bruno Flochon. En la dua tago ĝuste li prelegis pri la rilatoj kun ĵurnalistoj kaj amas-informiloj, kaj klarigis kiel pli bone konosci pri la labormetodoj de ĵurnalistoj dum ellaborado de dosieroj kaj komunikoj por la gazetaro. Reklamisto Richard Atlan praktike pruvis ke eblas produkti sen grandaj elspezoj informilojn kun profesia aspekto, prezentablajn al la publiko.

Fine, la IASI-anoj serĉis eblojn de informada kunlaboro inter siaj asocioj. La diskuto identigis kvar temojn, bazojn de kvar interasociaj komisionoj:

- profiti de la ĉi-jaraj eventoj (Universala Kongreso, centjariĝo de Esperanto en Francio);
- disponigi ĉiujn informojn al ĉiuj asocioj;
- rilati kun amasinformiloj;
- rebati, kaj rilati kun premgrupoj.

Laŭ raporto de Elisabeth Barbay en SAT-Amikaro, jan. 1998

Antaŭvide al la UK en Montpellier, jam post nia redaktotino okazis la Dua Interasocia Seminario pri Informado (14-15 marto, Tuluzo), kies temoj en fokuso estis ĝustaj kaj malĝustaj argumentoj por varbado pri Esperanto, kaj trejniĝo por intervjuoj radiaj kaj televidaj. Informas: Bruno Flochon, 6 C, avenue de l'Hippodrome, FR-69890 La Tour-de-Salvagny, Francio; ☎ +33/4/78-48-00-40; ✉ bflochon@esperanto.org. Vidu ĉi-sube la programon de la seminario.

Programo por la seminario

Sabato la 14-an de marto

- 9.00 akceptado
- 9.30 diskuto pri la celoj de la seminario
- 10.00 strategioj por prepari intervenon en radio, diferencaj tipoj de intervjuoj, fare de Michel Mathe, trejnistino pri radioĵurnalismo
- 12.00 tagmanĝo
- 13.30 preparado de radio-intervjuo
- 15.00 strategio por televid-intervjuo, sciindaj trukoj, gvidata de Greg Lamazère, ĵurnalistino de TLT
- 16.00 preparo de televidreportaĵo, gvidata de Agnieszka Moreau, ĵurnalistino de Arte
- 17.00 praktikado kaj intervju-trejnado antaŭ kamerao
- 16.00 forveturo (10 pers. maks.) por radio-praktikado en rekta elsendo (16.45) en radiostacio "Radio Mon País" sub gvidado de Rachida Laakrouchi, ĵurnalistino kaj radio-animantino

- 19.00 vespermanĝo
- 21.30 diskuto de argumentaro pri Esperanto

Dimanĉo la 15-an de marto

- 9.30 Esperanto en radio / AERA kun Bruno Masala
- 10.00 kiel praktike starigi priesperantan programon en loka radiostacio, kun Floréal Martorell
- 10.30 la diversaj kategorioj de radiostacioj, historio, teknikoj kaj leĝoj kiuj regas ilin, kriterioj por ilin aliri, kun Guy Mimart, eks-radioprogramisto de Radio France Toulouse kaj direktoro de Radio Okcitanio
- 12.00 tagmanĝo
- 13.30 laborgrupoj en komisionoj
- 17.00 bilanco de la seminario
- 18.00 fino

Influo aperas kiel regula suplemento al *Esperanto*. **Redaktoro:** Geoffrey Greatrex, 16 Henry Road, Oxford, Britio OX2 0DG; ✉ greatrexgb@cardiff.ac.uk **Informa Fakto de UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎ +31 10 436 1044; ✉ +31 10 436 1751; ✉ uea@inter.nl.net

Gazetaraj komunikoj

Surbaze de mia sperto en Brazilo, mi iam faris proponon al la tiama UEA-prezidanto, sed ricevis negativan respondon. Eble nun estas tempo por re-prezenti la ideon: Kunordiganto ricevos (de la esperantistaro) informojn pri gravaj okazaĵoj (pli bone: okazantaĵoj) rilataj al Esperanto aŭ la monda lingva problemo. Li preparos tekstojn en ĵurnalisma stilo (similajn al tiuj kiujn oni faras dum UK) kaj ilin sendos al landaj kontaktuloj, kiuj tradukos nacilingven la mesaĝojn kaj transsendos ilin al la redakcioj de gazetoj, radioj kaj televido. Per Interreto tio fareblas!

Roberto Resende

✉ rresende@brnet.com.br

La 15-an de nov. en la Domo de la Armeo estis prezentitaj *Al la mondo donace*, antologio de la serba porinfana poezio (vd. recenzon en jan., p. 14) kaj lernolibro por komencantoj de Boriša Miličević. Miličević kaj Ljubiša Preradović, prezidento de "La mondo", parolis ĉe la televido BEL pri la novaj libroj kaj pri Esperanto en literaturo. (Mico Vrhovac)

Svislando: Grupo varba

La estraro de Svisa Esperanto-Societo kreis laborgrupon pri varbado — konsistantan el Marion Bélisle, Sonja Brun, Bruno Graf, Nicole Margot, François Randin kaj Patrick Rentsch —, kiu difinis al si la taskon pretigi aktualajn informilojn kaj varbilojn, ĉar tiaj nun mankas ĉe SES. La grupo ankaŭ ellaboras ideojn por la Ago-Tago. (SES informas)

Esperanto valoras

La 15-an de decembro la tutmonde spektebla usona novaĵkanalo CNN dediĉis iom pli ol du minutojn al Esperanto.

Pli frue ĝi faris tion en 1995, okaze de la Tamperea UK, intervjuante Mark Fettes. Jen la teksto de la nuraj 135 sekundoj, dank' al transskribo de Kent Jones:

"Venki la lingvobarojn fariĝis nun stumbligilo por Eŭropa Unio, kaj tial lingva movado lanĉita antaŭ pli ol cent jaroj ekvidiĝas en nova lumo. [...]"

[surbilde: EU-konferenco]

Ekde la gorĝofunda gargaro germana ĝis la 'u' ĉe la lipopinto de franco, Eŭropo estas implikaĵo de lingvoj. La 15-nacia EU havas 11 oficialajn lingvojn, kaj ĉiun eldiron en unu lingvo necesas igi komprenebla en la dek aliaj, alie kreiĝas miskomprenoj, [surbilde: milit-damaĝoj] sed miskomprenojn neniu plu volas en Eŭropo.



Foto: Hans ten Hagen

Nederlando: Lingvokongreso

Ĉiun duan jaron okazas en Amsterdamo "Lingvo-Kongreso". Ĉi-jare, la 31-an de jan., reprezentiĝis per komuna stando — inter lingvaj organizaĵoj kaj eldonistoj — la landa asocio Esperanto Nederland kaj Fondaĵo Esperanto ĉe la Instruado. Milo da docentoj kaj instruistoj venis al la kongreso. Sur la E-stando troviĝis libroj pri Esperanto en pluraj lingvoj, atentokaptaj Esperantaj titoloj kiel *Winnie-la-Pu* kaj *Asteriks*, komputilo por demonstri E-ligojn kaj televidilo montranta la instruon vidbendon *Mazi en Gondolando*.

La sep deĵorantoj (i.a. tiuj surfote; de maldekstre: Atilio Orellana Rojas, Marc van Oostendorp, Saskia Idzerda kaj Dorle Kampmann) disdonis pli ol 100 dokumentujojn, kiuj enhavis faldfolion "Esperanto: la dua lingvo", broŝuron "De lingvoprojekto al vivanta lingvo", la Manifeston de la Esperanto-movado, freŝe reeldonitan E-ŝlosilon nederlandan (vd. "Laste aperis", p. 55) kaj la plej gravajn konkludojn de enketo pri sintenoj al E-o (vd. maj. '97, p. 88). Diskutoj kun interesatoj disvolviĝis foje eĉ angle kaj france.

Afiŝoj

Estas konsilinde ke ĉiu afiŝo pri Esperanto havu "oreletojn" deŝireblajn. Tiel la preterpasanto eĉ ne bezonos skribilon, nur deprenos la oreleton kaj poste esploros la aferon. La oreleto surhavu telefonnumeron (kaj/aŭ adreson) krom, devige, ret-adreson: aŭ de la landa E-asocio aŭ de la plurlingva TTT-paĝo <http://www.esperanto.net/>. (R. Resende)

Bosnio: Librofoiro

En Banja Luka (Respubliko Serba) Esperanto-Ligo de Respubliko Serba kaj la loka E-societo "La mondo" partoprenis internacian librofoiron (11-16 nov.), ekspoziciante Esperantajn librojn de verkistoj el eksa Jugoslavio kaj el la tuta mondo. Kelkaj vizitantoj aĉetis librojn kaj promesis aliĝi al kurso de "La mondo".

Nederlando: Telefonlibro

Laŭ estrara decido de la landa asocio Esperanto Nederland, en ĉiu el la 50 telefonlibroj de la lando aperas almenaŭ unufoje la numero kaj adreso de la Asocio. (Fen-X)

Aŭstrio: Universitatoj

Ekde junio 1997 disdoniĝis 2000 varbiloj en diversaj universitatoj de Vieno kaj Graz. Respondis ĝis mezo de oktobro 23 interesitoj, ĉefe studentoj, kiuj mendis la broŝurojn *Esperanto als Ratespass* ("Esperanto kiel divenludo"), de Esperanto-Junularo Heidelberg (Germanio), kaj la agado plu daŭras. (Walter Klag — "Retventoj")

Germanio: Lingvofoiro

En la 10-a Expolingua Berlina (20-23 nov.) e-istoj kolektis du dekdoujn da interesitoj pri Esperanto-kurso. (Berlina Informilo)



Foto: Komitato de Kataluna E-Asocio


Katalunio: Foiro

Centro de Esperanto Sabadell kaj Kataluna E-Asocio havis komunan budon en foiro de neprofitcelaj organizaĵoj en Sabadell (31 okt.-2 nov.) (Llibert Puig)

2 minutojn en CNN

[surbilde: grandskala printado]

Interpretado, tradukado, kontrolado, printado kaj reprintedo produktas okcent milionojn da paĝoj ĉiujare sole ĉe



Designo: Ronaldo de Oliveira

LI KOLEKTAS POR MENDI REKLAMON EN CNN

FAĈ 35

la Eŭropa Komisiono. Serĉata: Unu lingvo por Eŭropo!

[surbilde: la E-klubo en Londono]

Nu, la Esperanto-movado solvis tion jam antaŭ cent dek jaroj! La solvo por la eŭropa Babil-Babelo, Esperanto, signifas en Esperanto 'la homo kiu esperas'. Jarcenton poste, inter kvindek kaj cent mil idealistoj tutmonde esperas ankoraŭ ke ĉi tiu inventita lingvo fariĝos la dua lingvo de la mondo.

John Wells: Laŭ mi ĝi estas bonega kandidato por solvi la eŭropan lingvoproblemon, ĉar ĝi estas facila lingvo rapide lernebla, kaj se ni vere prenos ĝin serioze, okazus radikala ŝanĝo en la lingva aranĝo de Eŭropo.

[surbilde: Esperanto-instruado]

Forestas mutaj literoj, strangaj kombinaĵoj, konjugacioj, naciaj akĉentoj. Esperanto fakte sonas kiel pluraj lingvoj, ĉar ĝi radikas en pluraj el ili. [surbilde: libroservo, libroj] La Londonaj esperantistoj ekzerciĝas en societaj kunvenoj vendrede vespere, kaj la movado, kun sidejo en

Nederlando, havas ĉi tie librejon kun pli ol mil titoloj, originaloj kaj tradukoj. Kaj, nepre, kun Ŝekspiro.

Kroatio: Televido

Teamo de la kroata televido filmis la instruadon en Esperanto-kurso de la Zagreba bazlernejo Medvedgrad. La lernantoj vigle interparoladis, koncize sed utile informis pri Esperanto, kaj fine kantis "Frato Jakobo". La prezento elsendiĝis dufoje en porinfana programo. (Ivan Bekavac-Basić)

Hungario: Gazeto

"Perfekta lingvo" — tripaĝa, riĉe ilustrita artikolo pri Esperanto kaj Budapeŝtaj esperantistoj (i.a. kolektisto Károly Fajsz, TEJO-estrarano Attila Kaszás, *Evento*-redaktoro László Szilvási) aperis en anglalingva gazeto, *The Budapest Sun*, meze de novembro.

Usono: Ĵurnalo

Reage al la artikolo "Lingvo fariĝas milito per aliaj rimedoj", aperinta (10 dec.) en la usona ĵurnalo *Christian Science Monitor* (ĉ. 140 mil ekz.), UEA-membro Lee A. Miller salutis la mallongan, sed pozitivan mension de Esperanto en tiu teksto kaj demandis: "Ĉu je la fino de la 20-a jarcento, ni proksimiĝas al preteco ekuzi ĉi tiun lingvon por eviti la militojn priskribitajn en la artikolo?"

Francio: Radio

"Daniel Luez parolas al ni pri ĉi tiu eksterordinara lingvo": sub tiu titolo disaŭdiĝas, ekde aŭgusto, duonhora dimanĉa kroniko pri Esperanto ĉe Radio RFL en Laon. (*Norda Gazeto*)

NUN: la plej rapida informilo

Sveda E-Federacio ekfunkciigis la 3-an de marto, je la adreso <http://www.esperanto.se/nun/>, la elektronikan bulleton *NUN*, kiu celas esti "la plej rapida informilo de la Esperanto-movado". La informoj — pri tio kio okazis, okazas kaj okazos — estas aldonataj aŭtomate al *NUN* kaj legeblas tuj post la aldonado.

Verkanto povas esti ĉiu esperantisto kun aliro al Interreto. La aldonado al *NUN* okazas per plenigo de speciala formularo trovebla je la sama retadreso. Ne estas bezonata kodvorto por rajti aldoni informojn. La prizorganto Franko Luin tamen certigas ke aldonoj ne inform-karakteraj estos rapide forigitaj el la enhavlisto.

Retumantoj kiuj ne povas aliri kadrobazitajn TTT-ejojn, povas legi la informojn en *NUN* per la adreso <http://www.esperanto.se/nun/enhavo.html>. (Franko Luin, franko@esperanto.se)

David Graddol (aŭtoro de "La estonteco de la angla") legas en Esperanto: "Ĉu esti aŭ ne esti, — tiel staras nun la demando."

[surbilde: TTT-paĝoj en Esperanto]

Sed en la ciberspaca ĝangalo regata de la angla lingvo, la vera demando por la eta bataltaĉmento de Esperanto staras jene: 'Ĉu sukcesi aŭ simple transvivi?'

Aŭstrio: Gazeto

Aperis en la taggazeto *Salzburger Nachrichten* artikolo ("Mondlingvo preta je tuja uzo?", 5 jan.) kiu elstarigas la eblan rolon de Esperanto kiel lingva perilo en la plivastiĝonta Eŭropa Unio. Reagan leteron (19 jan.) de aktivulo, UEA-delegito Martin Stupp-nig, akompanis lia adreso (li loĝas en Esperanto-strato) kaj reprodukto de Esperanto-ekzamena diplomo de la iama aŭstra prezidento, Franz Jonas. Tutpaĝa "Intervjuo kun eŭropano el Arnoldstein" (t.e. Stupp-nig) aperis en la informilo de socialdemokratoj de tiu urbo kun 3300 loĝantoj. (L.Patek, M. Stupp-nig)

Hungario: Radio

Matena, unuhora elsendo de la tutlanda programo Petőfi (30 nov.) okupiĝis pri la nord-rusia etno udmurtoj (parenca al la hungaroj); la fikcia lingvo Europanto; revivigo de la lingvo latina; Esperanto kaj Eŭropo. Demandite, la esperantista lingvisto Blazio Vaha diris ke nun oni ne povus ĝeneraligi Esperanton kiel lingvon de Eŭropo, sed kun zorga preparo tiu eblo ne estas ekskludinda. (Blazio Vaha)

Aŭstralio: Gazeto

Tutpaĝa artikolo "Paul, la esperanto" prezentas la bahaan esperantiston Paul Des-sailly en la rubriko "Homoj, lokoj, perspektivoj" (10 feb.) de la aŭstralia ĵurnalo *The Chronicle*, legata de pli ol 100 mil homoj.

amaskomunikiloj

Katalunio: Radio

La 2-an de decembro (mardon) la aktivuloj Pako Belmonte kaj Llibert Puig estis intervjuitaj pri Esperanto en la ĉefurba kataluna televid-stacio. (*Kataluna Esperantisto*)

Pollando: Gazeto

La urba revuo de Staszów (14 mil loĝantoj), *Monitor Staszowski*, regule publikigas novaĵojn pri la aktiva Esperanto-vivo de la urbo. (Andrzej Sochacki)

Irano: Ĵurnalo

Unua laŭ eldonkvanto (416 mil) en la lando, la ĵurnalo *Hamšahri* ("Samurbano") la 17-an de dec. dediĉis sesonon de sia lasta paĝo al favoraj klarigoj pri la historio, aŭtoro kaj stato de E-o. La artikolo aperis responde al leganto kiu demandis pri Esperanto.

De pli ol unu jaro Sabz Andiŝan Instituto ade mendas en diversaj revuoj anoncojn pri Esperanto, kiuj vekas publikan atenton. Ĉiutage venas el diversaj partoj de la lando demandleteroj pri Esperanto, kaj post la fondo de Irana E-Centro la gazetaĵoj mencias de Esperanto konsiderinde multiĝis. La E-centro ankaŭ starigis rilatojn kun diversaj iranaj ret-serviloj, ĉe kiuj oni ĉiusemajne renovigas la informojn pri Esperanto. (M. Reza Torabi)

Pri persekutoj kaj komunikado

Antaŭ 60 jaroj, la 21-an de februaro 1938, la soveta organizo pri ŝtatekureco, NKVD, arestis la etatajn oficistojn de Sovetrespublikara Esperantista Unio kaj fermis ties oficejon en Moskvo. Arestoj de esperantistoj ja okazadis kaj pli frue kaj poste, sed ĉi tio estis la pinto de la stalinaj persekutoj al esperantistoj. Tiel ĉesis por 19 jaroj la organizita Esperanto-movado en Sovetio.

Dediĉe al tiu tragika datreveno, la 21-an de februaro en la Moskva muzeo de Andrej Saĥarov okazis publika debato sub la titolo "Rajto je internacia komunikado", kiun organizis Rusia Esperantista Unio, la Moskva oficejo de Transnacia Radikala Partio kaj Popola Rusia Esperanto-Movado. Ĉeestis ĉ. 50 personoj, inter ili kelkaj ĵurnalistoj. La aranĝo daŭris 4 horojn.

leteroj

Pri emblemoj

László Szilvási majstre skribas pri "Senpaga reklamo" (Influo n-ro 14, p. 129): preskaŭ ĉio estas subskribinda. Nur pri la insigno li eraras: "ne gravas kia, ĉu tradicia aŭ moderna... Mi vidis pli ol 100 diversajn..." Plene kontraŭe: estus pli ol centfoje pli bone uzi la saman insignon ol diversajn! Se ni en la movado ne lernos kunlaboron eĉ pri nia ĉie kaj ĉiutage uzenda insigno, ni multe perdos. Imagu se firmaoj kiel Esso, Shell aŭ McDonald's uzus ĉiujare kaj ĉiulande, ĉiuvilaĝe diversan emblemon! Ili komprenas la signifon de emblemo, sed la Esperanto-movado perdis jam dek jarojn ne uzante nur la modernan insignon kiun ĝi havas, tiun "rompitan ovon" kun tradicia steleto kaj la vorto Esperanto. Eĉ UEA uzas ĝin tro malforte. Laŭ nekomprenebla tradicio UEA uzas ĉiujare diversan emblemon, kiu reklamas ne pri Esperanto, sed pri iu halo, frukto, besto aŭ io tia.

Pentti Makkonen (Finnlando)

Kohera informado per Interreto

Kiam mia amiko Brian Barker, kiu organizas premagadon kaj informadon pri Esperanto en Britio, petis unu simplan Interretan adreson kiun li povus doni al ĵurnalistoj k.s., mi devis agnoski ke taŭga adreso ne ekzistas. Li celis adreson por la Tut-Tera Teksaĵo (TTT), per kiu oni povas rigardi paĝojn de informoj pri diversaj organizaĵoj,



Verkisto Vladimir Varankin (1902-1938), esperantista viktimo de Stalina terormurdo

Foto: Hungara Viro

agadoj, produktoj k.s.

Ja ekzistis kelkaj tiaj paĝoj por unuopaj Esperanto-organizaĵoj en Britio, sed nenio taŭga — kaj nenio en la angla lingvo — por ĵurnalistoj kiu deziras ricevi superrigardon de la tuto. Unu centra informejo, kun facile memorebla adreso, estus ege utile donebla ne nur al ĵurnalistoj, sed ankaŭ al politikistoj, studentoj, inform-petantoj kaj esperantistoj, ĉu ili vizitas la landon ĉu ili jam loĝas tie. Tamen neniu rigardis la aferon el ilia vidpunkto, sed nur el la vidpunkto de la inform-liveranto.

Do, koncizane revuon de la agadoj kaj organizaĵoj en Britio mi kompilis, menciante dek unu tiaĵojn. Inter ili estas la ĉefaj organizaĵoj: Esperanto-Asocio de Britio, Junularo Esperantista Brita, Esperanto-Instruista Asocio kaj SAT en Britio, kaj du fondusoj: Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo (NoJEF), kiu donas subvenciojn por vojaĝado al junaj esperantistoj, kaj Fonduso Grupo Kvin, kiun mi mem starigis antaŭ iom da tempo por instigi esperantistojn prezenti bone elpensitajn laborplanojn por inform-edukaj projektoj. Aldone al lokaj kluboj kaj diservoj en la lingvo, mi menciis la Esperantan Influgrupon ("Esperanto Lobby"), kiu premas por Esperanto de multaj jaroj, kaj ankaŭ la Esperantan Parlamentan Grupon. La plimulto de la mencioj havas ligojn al retpaĝoj kie oni povas havigi pliajn informojn per klako de butono. Bedaŭrinde la Esperanta Parlamentarisma Grupo ankoraŭ ne havas retpaĝojn, sed mi esperas labori tiucele. Se io tia iam aperos, ĝi estos tre intereskapta kaj por esperantistoj kaj por ĵurnalistoj. Aldone al la

Parolis prof. Sergej Kuznecov, movad-historiisto Nikolaj Stepanov, ĵurnalistoj kaj E-aktivulo Vladimir Samodaj, kaj pluraj aliaj esperantistoj kaj membroj de TRP. Temis kaj pri historio, i.a. pri la sorto de esperantistoj sub Stalino, kaj pri nunaj problemoj: disvastigo de Esperanto en Rusio kaj tuta Eŭropo, interrilatoj de Esperanto kaj ŝtata potenco ĝenerale, timo malkaŝi sian esperantistecon ktp. La laborantoj de la muzeo de Saĥarov, cetere, montris grandan intereson ricevi materialojn pri persekutoj al esperantistoj.

Raportaĵo pri la evento estis montrita la 23-an de februaro en vespera novaĵ-programo de NTV ("Sendependa Televido"). Lastatempe NTV duan fojon raportis pri esperantistoj: la 6-an de februaro, kun granda malfruo, ĝi informis pri la akcepto de esperantistoj en la Moskva ambasadejo de Hungario okaze de la Zamenhof-tago.

Nikolao Gudskov (Rusio)

britaj informoj, mi aldonis ligojn al la ĉefaj internaciaj informoj, kiel ekzemple la Virtuala Esperanto-Biblioteko, la listo de Esperanto-eventoj kompilita de *Eventoj*, kaj artikoloj pri Esperanto en la angla lingvo. La lingvo de la retpaĝoj estas la angla kaj Esperanto, kun spaco rezervita por la kimra. Mi esperas ke tiu ideo ekinteresos esperantistojn en aliaj landoj, tiel ke finfine povos aperi serio "Esperanto en..." por diversaj landoj en diversaj lingvoj — eble eĉ kun simila retadreso. La retadreso por "Esperanto en Britio" estas <http://www.esperanto.org/uk/>. La britaj esperantistoj estas nun petataj disvastigi tiun adreson, ekzemple en leteroj al gazetoj, parlamentanoj k.s. Kaj pri aliaj landoj... ni vidu.

Ian Fantom

lan@mintex.demon.co.uk

interreto

Svedio: Bibliotekoj

Ekde januaro oni povas legi sur Interreto, en *TT-Magasinet* (<http://www.algonet.se/~tt-mag>) kiuj eksterlandaj gazetoj kaj revuoj estas legeblaj ĉe la unuopaj bibliotekoj en la regiono de Stokholmo. La informoj estas en la lingvoj sveda, angla kaj Esperanto. La celo estas montri — unuavice al enmigrintaj civitanoj — kien oni povas turni sin por legi gazetojn en la propra lingvo.

La projekto estis realigita kunlabore kun Sveda Esperanto-Federacio, kies *Kiosko* (<http://www.esperanto.se/kiosk/espindex.html>), kun pli ol 3500 ligiloj al gazetoj tutmonde, estas vaste uzata de bibliotekoj kun Interreta angulo. Ĉiu unuopa paĝo de *TT-Magasinet* tial havas ligilojn al *Kiosko* por doni la eblon legi diverslingvajn gazetojn surekrane, se ili mankas en la biblioteko.

Franko Luin (franko@esperanto.se)


La freŝaj sloganoj kiuj funkcias por nova jarmilo

La komisiono pri informado de la usona landa asocio ELNA kolektas anglalingvajn reklamsloganojn pri Esperanto. Kelkaj proponitaj, en Esperanta traduko: "La internacia lingvo kiu funkcias"; "Esperanto: nova lingvo por nova jarmilo"; "Esperanto: jen io freŝa!" kaj "Frustras vin la franca? La rusa, tro ruza? Esperanto facilas!" (*Esperanto USA*)

Kalendaro 1998

MARTO

- 20-22: 4-a Danuba Esperanto-Rendevuo, Beograd, Jugoslavio (Terezija Kapista, Studentska 39/23, YU-11070 Novi Beograd; ☎+381/11/698-614; ✉659-694; ✉dimjan@eunet.yu)
- 21-23: Printempa Kurskunveno, Kameoka, Japanio (Oomoto*)
- 24-03 apr.: Printempa Festivalo, Budapeŝto, Hungario (HEA*)
- 27-29: Gastronomia Semajnfino (fiŝoj), Montagnac, Francio (Frédéric Durand, 13 rue Prof. Jean Garnier, FR-34070 Montpellier; ✉jefo@esperanto.org)



14-a Printempa Semajno Internacia, 6-13 aprilo, Germanio

- 27-29: Diskutforumo "Esperanto venkos malgraŭ la esperantistoj", Hraščina-Trgovišće, Kroatio (Orbis Pictus*; kun Vinko Ošlak kaj Zlatko Tišljarić)
- 28-29: 44-a Praktika Staĝo de Parolata E-o, Haguenau, Alzaco, Francio (Odette Scheidel, 35 rue Grande, FR-67660 Betschdorf; ☎+33/3/88-54-45-02; plurnivela inkl. porinfana; seminario de Marcus Sikosek pri informado)
- 28-29: Fonetikaj aspektoj de Esperanto, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*; prelegas Daniele Vitali)

- 28-29: Konferenco pri Kampanjo 2000, Stokholmo, Svedio (Wim Posthuma, Sol-datgatan 40, SE-72345 Västerås; ✉wimp@quicknet.se)

APRILIO

- 03-05: 30-a Tut-Kalifornia E-Konferenco, Santa Barbara, Kalifornio, Usono (5243 University Drive, Santa Barbara CA 93111-1732; ☎+1/805/569-3243; ✉72644.2450@compuserve.com; temo: "Vivriĉigo per E-o")
- 03-06: Junulara Esperanto-Renkonto, Győr, Hungario (Dániel Alko Golden, Damjanich u. 1/c. I.8, HU-8200 Veszprém; ☎+36/88/424-339; ✉golden@math.bme.hu; temo: "Trafiko")
- 04-05: 9-a Kongreso de Valencio kaj Murcio, Castellón, Hispanio (Grupo Esp., Avenida Peris y Valero, 96, 3a-5, ES-46006 Valencia, Hispanio; ✉+34/6/374-43-99; ✉a-casquero@redestb.es)
- 06-13: 14-a Printempa Semajno kaj 4-a Printempa Lernejo Internaciaj, Bonn, Germanio (Wolfgang Bohr, J.-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; ☎+49/2641/4885; ✉2641/978-666; ✉psi@esperanto.de; http://www.esperanto.de/psi)
- 07-10: 2-a Bretona E-Kantostaĝo, St. Brieuc, Francio (Clopeau, 6 rue J.P. Calloc'h, FR-22000 St Brieuc; ☎+33/2/96-94-08-54; ✉denis.clopeau@wanadoo.fr)
- 08-14: 10-a Alp-Adria E-Konferenco, Lignano Sabbiadoro, Italio (Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste; ☎/✉+39/40/763-128; ✉nored@iol.it; instru-seminario de Stefan MacGill)
- 08-14: 22-a Internacia Junulara Festivalo, Lignano Sabbiadoro, Italio (Friedrich Schreiber, Via dei Cordaroli 7, IT-

34135 Trieste; ☎+39/40/422-607; ✉763-128; ✉fulmo@ts.flashnet.it; http://www.newlog.it/esperanto/ijf98; temo: "Bunta Eŭropo")

- 10-12: "Pri io aŭ nenio", amuza kunesto, Poprad*, Slovakio
- 10-13: Paska Renkontiĝo de Nederlanda Esperanto-Junularo, kun jubilea koncerto de la grupo Kajto, Joure, Nederlando (NEJ, p/a Ingeborg van Dijk, Hooigracht 13, NL-2312 KM Leiden; ☎+31/71/514-89-39; ✉ivandijk@rullet.leidenuniv.nl; temo: "Konsumeti — malpli multe kaj pli konscie konsumi")

LA 82-A BRITA



KONGRESO DE ESPERANTO

82-a Brita Kongreso de E-o, 10-13 aprilo, Britio

- 10-13: 82-a Brita Kongreso de E-o, Chester, Anglio (Brian Burnett, Nant-yr-Hafod Cottage, Llandegla, Clwyd, LL11 3BG, Britio; ☎+44/1978/790-442; ✉106152.2120@compuserve.com; temo: "Esperanto por edukado")
- 11-13: 53-a Kongreso de SAT-Amikaro, St. Brieuc-Quintin, Francio (Clopeau, vd. ĉe 07-10 apr.)
- 15-19: Preparado al la skriba parto de la triagrada ekzameno, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Georges Lagrange)
- 17-19: 93-a Skota E-Kongreso, Dumfries, Britio (Sheila Burnett, 26 Langholm Street, Newcastleton, Roxburghshire TD9 0QX)



22-a Internacia Junulara Festivalo 8-14 aprilo, Italio Temo: "Bunta Eŭropo"

- 17-19: Gastronomia Semajnfino (vegetaraj manĝoj), Aime, Savojo, Francio (Pascal Lécaille, BP 3019, FR-69394 Lyon CéDEX 03; ☎/✉+33/4/72-36-07-14; ✉pascal.lecaille@wanadoo.fr)
- 17-19: Konversacia kurso, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus*; gvidas Spomenka Štimec)

* ADRESARO Jen la adresoj signitaj per asterisko tra la kalendaraj rubriko. Ĉiuj aliaj adresoj troveblas post la koncernaj aranĝoj.

Grésillon, Kultura Esperanto-Domo Grésillon, FR-49150 Baugé, Francio; ☎+33/2/41-89-10-34

HEA (Hungaria Esperanto-Asocio), Pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; ✉268-0331; ✉esperantohea@mail.c3.hu

KCE (Kultura Centro Esperantista), CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio; ☎/✉+41/32/926-74-07

Korea E-Asocio, Kang Byeon Han Shin Core B/D; No 601 Mapo-Dong 350, Mapo-ku, Seoul; ☎+82/2/717-69-74; ✉717-69-75; ✉keast@soback.komet.nm.kr

Kvinpetalo, Rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio; ☎+33/5/49-42-80-74

Monda Turismo, M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; ☎/✉+48/52/341-57-44; ✉turismo@bydg.pdi.net; http://www.bydg.pdi.net/~turismo

Oomoto, EPA, Oomoto, Ten'on-kyo, Kameoka-si, Kyoto-hu, 621-8686 Japanio; ☎+81/771/225-561; ✉250-061; ✉100507.1652@compuserve.com

Orbis Pictus, Viŝnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste, Italio; ☎/✉+39/40/767-875; ✉orbispictus@iol.it

Poprad, Esperanto-Regiona Societo, Sobotské námestie 36, SK-05801 Poprad; ☎/✉+421/92/324-19

Interreto. Daŭre aktualigata listo de ĉiuj konataj E-aranĝoj konsulteblas ĉe la TTT-paĝoj www.hungary.net/esperanto/. Ĝi estas ankaŭ ricevebla per sendo de jena mesaĝo al ✉w3mail@gmd.de: "get ftp://ftp.hungary.net/pub/esperanto/kalendar.txt". En papera versio ĝi aperas po monataj blokoj en *Eventoj*.

- 18-24: Pola sesio de AIS, Krakovo, Pollando (Jan Talik, Słoneczna 19/57, PL-32-050 Skawina; ☎+48/12/276-35-68)
- 20-26: 4-a Interreligia Seminario E-ista, Jerusalemo, Israelo (Jeremi Gishron, P.O.K. 23180, IL-91231 Jerusalem; ☎+972/2/586-62-49; ✉587-05-27; temo: "La geografia dimensio de la religia universo")
- 21-25: Lingvopraktikado kaj Inicado kaj praktikado de jogo, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Ferdi Vince resp. Arlette Plutniak)
- 24-26: Esperantologia-didaktika konferenco, Krakovo, Pollando (Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7 m. 122, PL-30-150 Kraków)
- 25: Jubilea Malferma Tago de la Centra Oficejo (UEA 90-jara), Roterdamo, Nederlando (adreso en la kolofono; kun prelegoj de Ed Borsboom, Ulrich Lins kaj Mark Fettes)



Jubilea Malferma Tago de la CO
UEA 90-jara
25 aprilo, Roterdamo

- 25-26: István Nemere renkontas la publikon, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*)
- 25-26: 20-a Urala Esperantista Renkonto, Nijnil Tagil, Ruslando (RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67; ☎+7/3432/220-481; ✉hrgo@sbank.e-burg.su; temo: "E-o en la provinco")
- 25-26: 8-a Internacia Kurskunveno, ĉe Kita Kjuŝu, apud Hukuoka, Japanio (Oomoto*)
- 25-02 majo: TEJO-seminario pri "Homaj rajtoj sub premo", Vitoria-Gasteiz, Eŭskio, Hispanio (Lariko Golden, Damjanich u. 1/c.I.8, HU-8200 Veszprém, Hungario; ☎+36/88/424-339; ✉+36/1/282-88-85; ✉golden@osiris.elte.hu)
- 25-03 majo: 23-aj E-Tagoj, Kurso por internaciaj vojaĝgvidantoj kaj 2-a Baka-lauriga Universitata Sesio de AIS, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo*)
- 30-03 majo: 1-a Sudorienta E-Renkontiĝo, Rio-de-Janeiro, Brazilo (AERJ, R. Senador Dantas, 117 - Sala 1341, BR-20001-970 Rio de Janeiro - RJ; temo: "Defio de tutmondigo")
- 30-03 majo: Printempa E-ista Renkontiĝo en Altaj Tatroj, Poprad*, Slovakio
- 30-03 majo: 51-a Kultura Semajnfino de Sarlanda E-Ligo kaj Jubilea Festo de la 25-jara Bahaa E-Ligo, Homburg, Germanio (SEL, P.O.K. 1844, DE-66470 Zweibrücken; ✉owalz@aol.com resp. ✉bahaaligo@aol.com)

MAJO

- 01-03: 57-a Hispana E-kongreso, Valladolid, Hispanio (Apdo 119, ES-47080 Valladolid; ✉admin@esperanto-es.org)
- 01-03: 1-a Rendevuo pri E-o kiel laborlingvo ĉe la kampo de sano, Ribeirão Preto, Brazilo (Inst. pri Homeopatio, Rua A. Brasi-liense 1418, BR-14015-150 Ribeirão Preto - SP; ☎+55/16/636-88-89; ✉636-50-65; ✉lamasson@netsite.com.br, http://www.netsite.com.br/lamasson)
- 01-03: Ornitologia semajnfino, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Ru Bossong kaj Johano Rapley)
- 01-04: 5-a Krakova festivalo de la E-kulturo, Krakovo, Pollando (Grażyna Maszczyńska-Góra, ul. Armii Krajo-wej 1 m. 14, PL-30-150 Kraków; ☎/✉+48/12/637-53-90)
- 03-10: Aroma Jalto '98, Jalto, Ukrainio (Vladimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv; ☎+38/044/295-17-01; ✉295-28-70; ✉lnp@un.kiev.ua)
- 08-10: 18-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, Leiria, Portugalio (Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6, r/c A, PT-1500 Lisboa; ☎+351/1/714-13-59; ✉bacano.fc.ul.pt)
- 08-11: Latvia Internacia Printempo, Cēsis-Priekulji, Latvio (Māra Timermane, Valdemāra iela 145/1-32, Rīga 1013; ☎+371/2/361-395; ✉espero@ngo.org.lv)
- 15-17: Jarkongreso de Sveda E-Federacio, Stokholmo (SEF, Vikingagatan, SE-11342 Stockholm; ☎+46/8/340-800; ✉340-810; ✉sef@esperanto.se)
- 16-22: 50-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio, Aalborg, Danio (50-a IFK, Banegårdspladsen 14, DK-9700 Brønderslev; ☎/✉+45/98-80-15-99)




50-a Kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio,
16-22 majo, Danio

- 19-24: Hungaria Esperantista Semajno, Budapeŝto (HEA*; temo: "En kaj ekster Eŭropa Unio")
- 25-26: 2-a Danuba Esperantista Scienca kaj Kultura Forumo, Budapeŝto, Hungario (HEA*; vd. p. 58)
- 29-31: Nord-Okcidenta Regiona E-Konferenco, Olympia, Vaŝingtonio, Usono (4314 North Cheyenne, Tacoma, WA 98407-5012; ☎+1/253/756-9335; ✉norek98@esperanto.org, http://www.halcyon.com/lkerr/norek98)
- 29-31: 2-a Kongreso de Slovakia Esperanto-Federacio, Koŝice, Slovakio (vd. Poprad*)
- 29-01 jun.: 75-a Germana E-Kongreso, Freital apud Dreseno, Germanio (Wolfgang M. Schwarz, Neundorferstr. 53, DE-01257 Dresden; ☎+49/351/203-62-86; temo: "Klerigo, kulturo kaj E-o")

- 29-01 jun.: 6-a Internacia Kultura Semajnfino, Antverpeno, Belgio (Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; ☎+32/3/234-34-00; ✉233-54-33; ✉esperanto@agoranet.be, http://esperanto.agoranet.be/fel; Temo: "Eldonado")
- 30-31: 31-a Hungarlanda E-Kongreso, Budapeŝto (HEA*)
- 30-31: Dua kongreso de kroataj esperantistoj, Varaždin (Kroata E-Ligo, Amruševa 5/I, HR-10000 Zagreb; ☎/✉+385/1/481-01-52; ✉esperanto@zg.tel.hr)
- 31-02 jun.: Traduka semajnfino, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Georges Lagrange)

JUNIO

- 09-18: 20-a Ĉebalta E-ista Printempo, Mielno, Pollando (PEA, pk. 30, PL-75-016 Koszalin-1; ☎+48/94/404-563)



Somera Esperanto-kurso,
12-20 junio, Svedio

- 12-20: Somera Esperanto-kurso, tri niveloj, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Folkhögskola, Esperanto, Box 192, SE-69124 Karlskoga; ☎+46/586/64-600; ✉64-622)
- 19-23: 12-aj E-Tagoj, Staszów, Pollando (E-Klubo, Parkowa 6, PL-28-200 Staszów, Pollando; ☎+48/15/864-13-67)
- 19-03 jul.: Internacia Amika Renkonto, Gré-sillon*, Francio
- 20-27: Internacia Ferio-Semajno de TANEF, Almelo, Nederlando (Abel Lingbeek, Fogelsanghstate 4, 7608 HJ Almelo)
- 26-30: 8-a Eŭropa Esperanto-Forumo, Sankt-Peterburgo, Rusio (Monda Turismo, RU-197022 Sankt-Peterburgo, Ab. ja. 130)
- 27-28: Trilanda Renkontiĝo, Dinant, Belgio (Senlime, Trude Sinno, In 't Oord 45, NL-6291 VN Vaals, Nederlando; ☎+31/4330/62-015)
- 27-28: Kultura monatfino pri denaskismo, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*)
- 27-05 jul.: FREŜO '98, Elk (27-30.) kaj Olsztyn (01-05.), Pollando; partopreneblas po duono (Barbara Blażejewska, ul. Moniuszki 8/2, PL-19-300 Elk; Andrzej Gielert, Murzynowskiego 22/27, PL-10-684 Olsztyn; ☎+48/89/542-88-98; ✉533-47-60; ✉krist@moskit.art.olsztyn.pl)
- 29-03 jul.: 30-a Somera E-Studsemajno, Jyväskylä, Finnlando (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä; ☎+358/14/254-609; instruas Joel Brozovsky kaj Márta Kovács)
- 30-05 jul.: Seminario por instruistoj de la Zagreba metodo, Hrašćina-Trgovišće, Kroatio (Orbis Pictus*; Zlatko Tišljar, Spomenka Štincec kaj Višnja Branković)

JULIO

- 01-06: Vladivostokaj E-Tagoj junularaj, Ruslando (Aleksandr B. Titajev, RU-690090 Vladivostok, Do vostrebovanija; espero@pub.marine.su)
- 03-05: Tutlanda Somera Kunloĝado, Taejon, Koreio (Korea Esperanto-Asocio*)
- 03-10: Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj, Grésillon*, Francio
- 05-24: 29-a Somera Kursaro, San-Francisko, Usono (Cathy Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010; [+1/650/342-1796](tel); instruas Aleksander Shlafer, John Wells, Katalin Smidélusz kaj Kanae Hirose)
- 07-11: Praktikado de la lingvo kaj Preparado al Altaj Studoj, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Dominique Baron)
- 10-17: Kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj, Grésillon*, Francio
- 10-18: 2-a Somera E-Lernejo, Banja Vrućica, Bosnio kaj Hercegovino (E-Ligo de Serba Respubliko, Pk. 335, BA-78001 Banja Luka; esperoel@etf-bl.rstel.net)
- 10-24: Somera Esperanto-Lernejo, Poprad*, Slovakio
- 14-19: Enkonduke al jago, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*); gvidas Fernando Vurpillod)
- 17-24: Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj, Grésillon*, Francio
- 17-24: Turisma Semajno, Poprad*, Slovakio
- 18-24: Internacia E-Konferenco de OSIEK, Triesto, Italio (Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste; [+39/40/763-244](tel); [+39/40/763-128](tel); nored@iol.it, <http://www.geocities.com/Athens/Olympus/7242/Trieste/html>; temo: "Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mondkulturo")
- 18-24: 34-aj Baltiaj E-Tagoj, Veisiejai, Litovio (Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas; [+370/7/208-503](tel); [+370/7/208-616](tel))
- 18-25: 71-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Odeso, Ukrainio (Grigorij Geht, str. Bebelja 9/38, UA-270014 Odeso, Ukrainio; [+38/0482/217-336](tel); vdp-slot@eurocom.odtel.net, <http://www.worldnet.net/~sat-esp/>)
- 18-25: 20-a Renkontiĝo de E-istaj Familioj, Mosonmagyaróvár, Hungario (Slezák, Damjanich u. 2, HU-9200 Mosonmagyaróvár; [+36/96/211-271](tel))
- 18-01 aŭg.: 17-a Katolika E-Tendaro, Sebrance apud Litomyšl, Ĉeĥio (Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-75127 Penčice)
- 19-24: 34-a Brazilo Kongreso de E-o kaj 19-a Brazilo E-Junulara Kongreso, Salvador, Brazilo (C.P. 945, BR-40001-970 Salvador - BA; esperanto@gd.com.br)
- 19-25: Somera E-Kursejo, Jekaterinburg, Ruslando (RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67; [+7/3432/220-481](tel); hrgo@sbank.e-burg.su)
- 19-25: 12-a Internacia Junulara Semajno, Kecskemét, Hungario (D. A. Golden, vd. 03-06 apr.; temo: "Homo ludens")
- 20-25: Praktikado de la lingvo (dua nivelo), Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Marie-Thérèse Lloancy)
- 20-31: Internacia Metodika Seminario de ILEI por E-instruantoj, Grésillon*, Francio (po semajnon gvidas Duncan Charters kaj Katalin Smidélusz)
- 21-25: 5-a MIRO (Mara Internacia Renkontiĝo), Savudrija, Kroatio (Ivan Munić,

KEJA, Amruševa 5/I, HR-10000 Zagreb; [+385/1/481-01-52](tel); ivan.munic@alpha1.fsb.hr, <http://pubwww.srce.hr/keja>)

- 21-26: Problemoj de interkultura komunikado, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*); gvidas Sabira Ståhlberg)
- 22-07: Internaciaj Semajnoj de la Martinus-Centro, Klint, Danio (Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-95, DK-2000 Frederiksberg; [+45/38-34-61-80](tel); martinus@centrum.dk; kun E-instruado de Atilio Orellana Rojas kaj Joel Brozovsky)
- 24-29: Lorca kaj la hispana poezio ĉi-jarcenta, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; gvidas Miguel Fernández Martín)
- 24-31: Kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj, Grésillon*, Francio
- 25-27: Nord-Amerika Kongreso de E-o, Montrealo, Kanado (Normand Fleury, 6358 rue de Bordeaux, Montréal QC, H2G 2R8; [+1/514/272-01-51](tel); esperanto@sympatico.ca, <http://www3.sympatico.ca/esperanto>)
- 25-30: Kultura E-Semajno kun Cseh-metoda E-kurso, Valencio, Hispanio (Augusto Casquero, Ave. Burjasot 29, A-31, ES-46009 València; [+34/6/340-13-69](tel); [+34/6/340-13-69](tel); a-casquero@redetb.es; instruas Anton Zachariáš)
- 25-30: 27-a Internacia Naturamika Renkontiĝo, Pécs, Hungario (BEE, Pf. 98, HU-7601 Pécs; [+36/72/333-123](tel); szucs@geod.pmmfk.jpte.hu)



54-a Internacia Junulara Kongreso, 25 julio - 1 aŭgusto, Rijeka, Kroatio

- 25-01 aŭg.: 54-a Internacia Junulara Kongreso, Rijeka, Kroatio (Ivica Ivaci, KEJA, Amruševa 5, HR-10000 Zagreb; [+385/1/481-01-52](tel); iviaci@jagor.srce.hr, <http://pubwww.srce.hr/keja>; temo: "Amaskomunikiloj—kreatoj de amaskulturo")
- 25-01 aŭg.: 13-a Ekumena kongreso de KELI kaj IKUE, Nantes, Francio (Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet, FR-86340 Nouaillé-Maupertuis; diaregno@altern.com, <http://www.citeweb.net/filipo/index.htm>)
- 25-01 aŭg.: 64-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Artigues apud Bordojo, Francio (Monique Dussenty, 76 ave. La Fontaine, FR-33560 Carbon-Blanc; [+33/5/56-06-74-49](tel))
- 31-07 aŭg.: Kursoj por komencantoj (unua parto), praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon*, Francio

AŬGUSTO

- 01-08: 83-a Universala Kongreso de Esperanto, Montpeliero, Francio (CO de UEA, adreso kolofone; temo: "Mediteraneo — ponto inter kulturoj")



- 01-08 FESSTO, junulara programo de la UK (vd. "Kongresa komunikilo", p. 45)
- 01-08: 31-a Internacia Infana Kongreseto (p. 45)
- 07-14: Kursoj por komencantoj (2a parto), praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon*, Francio
- 08-09: 1-a Forumo por la Esperanta civito, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*)
- 08-11: Seminario pri verda politiko '98, La Couvertoirade, Larzac, Francio (Sion, Ch. de Fontinettes, FR-59552 Lambres-les-Douai; [+33/3/27-97-87-87](tel); mpSION@nordnet.fr, http://www.comlink.apc.org/ave/aveno_a.htm)
- 08-14: 32-a Konferenco de ILEI kaj ILEI-Gimnazio por 12-16-jaruloj, Montpeliero, Francio (Bertil Andréasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby, Svedio; temo: "Lingvoinstruado, ponto al la mondo")
- 08-15: Konferenco de Internacia Komunista E-ista Kolektivo, Durban-Corbières, Francio (Vilhelmo Luterano, Fonto Gazela, FR-11360 Embres-et-Castelmaure; [+33/4/68-45-81-32](tel); 100070.2001@compuserve.com)
- 08-22: E-Semajnoj de la Martinus-Centro, Klint, Danio (vd. ĉe 22 jul.-7 aŭg.; pri kosmologio, kaj E-instruado de Aleksander Kogan kaj Joel Brozovsky)
- 09-11: Praktikado de la lingvo, Bouresse, Francio (Kvinpetalo*; Paŭlo Gubbins)
- 09-16: Junulara Ekumena E-Tendaro, Taizé, Francio (Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen, Germanio; [+49/7721/22-073](tel); [+49/7721/22-074](tel); b.eichkorn@t-online.de)
- 10-16: 6-a Kultura E-Festivalo, Lesjöfors, Svedio (Janko Luin, Mygdalsv. 123, SE-13542 Tyresö; janko@esperanto.se, <http://www.esperanto.se/kef>)
- 10-17: 5-aj Someraj Kursoj, Istrio, Kroatio (Orbis Pictus*); instruas Višnja Branković kaj Spomenka Štimec, prelegas Ivo Borovečki)




- 10-24: 33-a Internacia E-Feriado kaj seminario pri kvakerismo, Karpacz, Pollando (Eric Walker, Nacton, Ipswich, IP10 OLA, Britio; [+44/1473/717-088](tel); [+44/1473/717-088](tel); ericwalker@gn.apc.org, <http://www.frumious.demon.co.uk/feriado.html>)
- 12-18: 1-a Plurnivela Internacia Kursaro, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*); gvidas Claude Gacond, Giorgio Silfer, Sabira Ståhlberg kaj Ágnes Verrasztó)

- 12-19: Internacia Esperanto-Staĝo, Plouézec, Francio (Roger Eon, 5 Kervilin Izelan, FR-22470 Plouézec; ☎/✉+33/2/96-22-77-17; ☐rogeon@club-internet.fr; instruas Katalin Smidéliusz)
- 14-21: Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj, Grésillon*, Francio
- 14-23: Internacia Renkontiĝo de Interesaj Homoj, Bjalistoko, Pollando (E-Centro Zamenhof, Piĝna 3, PL-15-282 Bjalystok; ☎/✉+48/85/454-600; ☐f-zamenhof@centrumtur.sitech.pl)
- 15-21: 38-a Internacia Somerlernejo, tri-nivela kursaro, kaj ILEI/UEA-ekzameno je elementa nivelo, Barlaston, Britio (Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffs., Britio ST12 9DG; ☎+44/1782/372-105; ✉372-393; ☐wedgwood.college@staffordshire.gov.uk; instruos/prelegos Marjorie Boulton, Tim Carr, Roselyne Edwards, Paul Gubbins, Kate Hall kaj Aleksandr Melnikov)
- 17-27: OkSEJT-38 (junulara tendaro), Moskvo, Ruslando (Grigorij Arosjev, RU-117071 Moskvo, ab. ja. 31)
- 18-23: Literatura kurso, Hraščina-Trgovišče, Kroatio (Orbis Pictus*; gvidas Spomenka Štimec; temo: "Virino en la Esperanta literaturo")
- 19-25: 6-a Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, Pekino, Ĉinio (Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, ĉe Ĉina Akademio de Sciencoj, 52 Sanlihe, CN-100864 Beijing; ✉+86/10/68-51-24-58; ☐lrf@lasgsg4.iap.ac.cn)
- 21-23: Rumana Fervojaŝta E-kongreso, Sibiu, Rumanio (Mihai Stefan, Str. Politehnicii 1, RO-2200 Braşov; ☎+40/68/424-646; ✉+40/1/312-32-00)
- 21-23: 1-a Renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj katolikaj e-istoj, Žilina, Slovakio (Vladimír Nĕmec, Zvolenská 5, SK-01008 Žilina)
- 21-23: Barents-regiona Renkontiĝo, Tana, nord-orienta Norvegio (Herolv Olsen, Postboks 453, NO-9001 Tromsø; ☎+47/77-68-33-16)
- 22-26: 67-a Itala E-Kongreso, Frascati apud Romo, Italio (Carlo Sarandrea, Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma RM; ☎/✉+39/6/632-839; ☐c.sarandrea@agora.stm.it; temo: "Eŭropa mono – eŭropa lingvo")
- 23-28: 17-a Internacia Literatura Forumo, Swidnik, Pollando (Tomasz Chmielik, ul. Jarzebinowa 3/30, PL-21-040 Swidnik; ☎+48/81/468-16-25; ✉751-57-13; temo: "La juda kulturo kaj ĝia kontribuo al la Esperanta")
- 27-30: 3-a Esperantista Renkontiĝo de Serba Respubliko, Prijedor, Serba Respubliko, Bosnio kaj Hercegovino (E-Ligo de SR, vd. ĉe 10-18 jul.)
- 28-30: Internacia renkonto de "Sistemo pri interŝanĝoj kaj reto pri interŝanĝo de scioj", Montpellier, Francio (Émile Mas, Galapian, FR-47190 Aiguillon; ☎/✉+33/5/53-87-29-78; ☐rene.ballaguy@hol.fr)
- 29-05 sept.: Internacia Semajno Esperantista, Sète (Esperanto, 5 rue Docteur Roux, FR-34090 Montpellier; ☎+33/4/67-54-15-43)
- 31 aŭg.-19 dec.: Tutsestra Esperanto-kur-

so, Karlskoga, Svedio (Karlskoga Popola Altlernejo, Esperanto-fako, Box 192, SE-69124 Karlskoga; ☎+46/586/64-600; ✉64-622)

SEPTEMBRO

- 03-06: Mikologia seminario, Poprad*, Slovakio
- 04-06: Gastronomia Semajnfino (ĉokolado), Bulonjo-sur-Mar, Francio (Alain Fagot, Egelantiersstr. 12B, NL-1015 PL Amsterdam, Nederlando; ☎31/20/626-55-09; ☐jefo@esperanto.org)
- 04-08: 12-a Kongreso de Itala Katolika Unuiĝo E-ista, Arenzano, Italio (Mario German, V. Canepa, 57, IT-16030 Sori GE, Italio; ☐marger@split.it)
- 07-13: 90-jara jubileo de E-agado en Lodzo, Pollando (Lodza Filio de PEA, ul. Moniuszki 5, 90-101 Łódź, p.k. 337; http://www.ikki.com.pl/esperant)
- 12-13: E-ista Malgrandkarpata Renkontiĝo, Bratislava, Slovakio (Alica Komlóši, Rovnikova 6, SK-82102 Bratislava; ☎+421/7/291-604)
- 13-20: Esperanto – Komerca Agado, kurso, elmontrado de varoj, prelegoj, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus*)
- 18-20: 3-a Hansa E-Tago, Låsby, Danio (Esperanto-Kiel, Johannesstr. 54, DE-24143 Kiel, Germanio; ☎+49/431/737-788)
- 24-27: Montkabana Renkontiĝo, Bad Godesheim, Aŭstrio (Aŭstria Esperanto-Junularo, Poŝtfako 804, AT-8011 Graz)



14-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES), 25-27 septembro, Pollando

- 25-27: 14-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto (ARKONES), Poznań, Pollando (Paweł Janowczyk, ul. Zawady 2/7, PL-61-002 Poznań; ☎+48/602/352-664)
- 25-28: Internacia Amikeca Renkontiĝo, Aylesford, Britio (Anica Page, 37 Bullfinch Close, Riverhead, Sevenoaks, Kent TN13 2BB)
- 26-27: Kiel kaj kion reklami pri E-o?, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*)
- 26-30: Seminario Esperanto 2000, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo*)
- 26-04 okt.: 24-a Internacia E-Forumo de Turismo kaj Kulturo, Bydgoszcz, Pollando (Monda Turismo*)

OKTOBRO

- 02-04: 11-a Kultura Festivalo, Ústí nad Labem, Ĉeĥio (Josef Kříž, Družstevní 411/11, CZ-40007 Ústí nad Labem)
- 03: Internacia Ago-Tago
- 03-04: 85-a Japania E-kongreso, Kanazaŭa, Japanio (Japania E-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tōkyō-to

162; ☎+81/3/32-03-45-81; ✉32-03-45-82; ☐jei@mre.biglobe.ne.jp)

- 03-10: 6-a Internacia E-Semajno, Calafell (Tarragona), Katalunio, Hispanio (HFEA, Apdo 15027, ES-08080 Barcelona; ☎+34/3/727-50-21)
- 08-11: Metodika seminario, Rijeka, Kroatio (Orbis Pictus*; gvidas Katalin Smidéliusz)
- 09-11: 30-a Korea Kongreso de E-o, Taejon, Koreio (Korea E-Asocio*)
- 09-12: 52-a Argentina E-Kongreso, Pcia R. Sáenz Peña, Argentino (Saenzpenja Esperanto-Klubo, Calles 119 y 122, AR-3700 Pcia R. Sáenz Peña; temo: "Kiel levi la profesi-nivelon de E-o")
- 10-12: 5-a Internacia Semajnfino E-ista, Ludlow, Vermonto, Usono (E-Societo Kebekia, adreso kiel ĉe 25-27 jul.)
- 11-18: TEJO-seminario pri "Lingvaj rajtoj – lingvo-politiko", Budapeŝto, Hungario (L. Golden, vd. ĉe 25 apr.-02 majo)
- 23-25: Gastronomia Semajnfino, Tuluzo, Francio (Sylvie Roques, 8 rue Jean Soula, FR-31240 St. Jean, ☐sylvie.roques@wanadoo.fr)
- 29-01 nov.: Ruslanda E-Kongreso '98, Tomsk (RU-634055, Tomsk-55, a/k 2289; ☐gbasov@hcei.tomsk.su, http://www.hcei.tomsk.su/REK-98; temo: "Socia partnereco – determino de rolo kaj loko de E-organizaĵoj en Rusio")

NOVEMBRO

- 07-08: 9-a kongreso de Ukrainia E-Asocio, Kijiv, Ukrainio (Vladimir Hordijenko, p.k. 35, UA-252133 Kijiv, ☎+38/044/295-17-01; ✉295-28-70; ☐lnp@un.kiev.ua)
- 13-15: 10-a Sudbrazila E-Renkoniĝo, Florianópolis, Brazilo (Fondaĵo Simpozio, Rua Conselheiro Mafra 176, BR-88000 Florianópolis – SC)
- 13-15: Kolokvo "Aplikoj de E-o en scienco kaj tekniko" (KAEST), Prago, Ĉeĥio (Kava-Pech, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; ☎+420/2/991-22-01; ✉991-21-26; ☐chrde@kava-pech.cz; temoj: "Modernaj rimedoj de komunikado: avantaĝoj kaj problemoj" kaj "Terminologiaj problemoj rilate aplikon de E-o en scienco kaj tekniko")
- 20-22: Kultura E-Festivalo, Santiago de Cuba, Kubo (Kuba E-Asocio, Apdo 5120, CU-10500 La Habana; ☎+53/7/404-484 kaj 401-364; ✉338-729; ☐kubesp@mail.infocom.etecsa.cu)
- 22-23: 15-a Kulturkunveno de E-o, Kameoka, Japanio (Oomoto*)
- 28-29: Speciala monاتفino pri KCE 30-jara, La Chaux-de-Fonds, Svisio (KCE*; kun David Buhlmann kaj Claude Gacond)


DECEMBRO

- 27-03 jan.: 15-a Internacia Festivalo por junaj familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj, Saarbrücken, Germanio (Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein; ☎+49/5624/8007; ✉5624/322; http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm)

1999, JULIO


- 31-07 aŭg.: 84-a Universala Kongreso de Esperanto, Berlino, Germanio (CO de UEA, adreso en la kolofono; http://www.geocities.com/SoHo/Studios/6120/)

Laste aperis



Bona lingvo, La (2-a eld.) Claude Piron (1931). Vieno: IEM, 1997. 109p. ISBN 3 901752 11 7. 23cm. Elokventa, konversacista pledo por la riĉeco de la "reala", parolata Esperanto, surbaze de psikologiaj, stilaj kaj sociaj konsideroj. Kun postparolo al la nova eldono. 22,50 gld.

Cezaro (2-a, neŝanĝita eldono). Mirko Jeluŝiĉ. El la germana kaj kroata trad. Ivo Rotkviĉ. Zagreb: Fontoj, 1997. 486p. 21cm. Bind. Historia romano pri la romia imperiestro, en traduko kiu montriĝis epokfara je sia apero en 1936. 60,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Du belaspektaj reeldonoj: dum Cezaro restis konata nur en sia E-traduko, La nova realismo publikigis, per la ponto de Esperanto, en 16 lingvoj.

Costi della (non)comunicazione linguistica europea, I. Itallingva. 148p. Vd. ĉe *Kostoj*. . . 48,00 gld.

Costs of European linguistic (non)communication, The. Anglalingva. Trad. Jonathan Chaloff. 149 p. Vd. ĉe *Kostoj*. . . 48,00 gld.

Denkwürdiges aus dem Leben und Wirken unseres geistlichen Herrn Veters und Onkels Prälat Johann Martin Schleyer (1898). Katharina kaj Elisabeth Hartmann, Aloisia Hauck. Saarbrücken: Edition Iltis, 1997. 4+16p. ISBN 3 932807 02 2. 20cm. Germanlingva. Familianoj pri la patro de Volapuko. 9,00 gld.


Esperanto et franc-maçonnerie 1905-1998. Beauville: La Vivanta Lumo, 1998. 52p. 21cm. Francilingva. Pri kelkaj ligoj inter framasonismo kaj Esperanto. Kun 12-paĝa "Oklingva framasona vortlisteto". 4,80 gld.

Altiĝis lastatempe ĉiuj prezoj de Fonto-libroj. Ekz. Gerda malaperis! — nun 13.80 gld.; Ili kaptis Elzan! 24,00 gld; Cent jaroj da soleco 55,50 gld; Hefairo dancas 57,00 gld. ktp.

Esperanto Sleutel. *Beknopte grammatica en woordenlijst.* Esperanto Nederland, 1997. 47p. ISBN 90 803226 4 4. 15cm. Modernigita "ĝlosilo" kun skiza gramatiko kaj listo de 1500 bazaj vortoj. 1,80 gld.

Esprimaro franca-Esperanta (2-a, reviziita eldono). Lucien Bourgois. Kunlaboris André Gilles kaj Georges Lagrange. Beauville: Cercle Amical Espérantiste, 1997. 239+49p. 21cm. Kun suplemento. Unudirekta. Preskaŭ 4000 esprimoj. 24,00 gld.

Jarkolekto Esperanto 1997. Rotterdam: UEA, 1998. 220p. 27cm. Bind. 51,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Konspiro. *Dokumentoj pri decido de Stalin kaj Hitler likvidi Litovion kaj aliajn suverenajn ŝtatojn en la jaroj 1939-1941.* Kompilis Vilius Kavaliauskas. El la litova trad. Telesforas Lukoševičius. Panevėžys: E-Klubo Revo, 1992. 43p. 20cm. 4,50 gld.

Kostoj de la eŭropa lingva (ne-)komunikado, La. Red. Reinhard Selten; projektis G. Pagano; kunordigis C. Minnaja. El la itala (parte) trad. Umberto Broccatelli. Roma: "Esperanto" Radikala Asocio, 1997. 148p. 24cm. Studoj pri la kostoj (ne nur monaj) pro manko de komuna lingvo eŭropa. 48,00 gld.

Morto de Ivan Iliĉ, La (1886). Lev Tolstoj (1828-1910). El la rusa trad. Valentin Melnikov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. 53p. 20cm. "Ordinara morto de ordinara homo": senkompata prezento de vivo sen senco kaj celo. 6,00 gld.

Nova Realismo, La. *La konsekvencoj de la Nova Pensado* (1988). Bruno Vogelmann (1909). El la germana trad. la aŭtoro. Dobřichovice: Kava-Pech, 1998 (3-a eld.). 191p. ISBN 80 85853 36 1. 21cm. Bind. Argumentoj por mondkoncepto bazita sur respekto al la vivo kaj al la homa racio. 30,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Per Esperanto — por aŭtentika informado. *Pri nuntempa Bulgario, Esperanto kaj la Esperanto-movado; Eseoj, recenzoj, reagoj* (1992-1997). Nikola Aleksiev (1909). Red. Detlev Blanke. Berlin: la redaktinto, 1998. 122p. 30cm. Verkoj de unu el la plej gravaj kaj aktivaj bulgaraj esperantistoj, Honora Membro de UEA, ĵurnalisto. 30,00 gld.

Pri la plej bona ŝtatformo kaj la nova insulo Klaŭstralio. *Libreto vere brila, ne malpli bonefika ol amuza* (1995). István Bejczy (1965). El la nederlanda trad. István Ertl. Creuë: La Gazeto, 1997. 24p. 25cm. Omaĝo al la klasika *Utopio* de Thomas Morus, sed inspirita de sociaj kaj kulturaj demandoj de la nuntempo. Speciala numero de *La Gazeto*. 12,00 gld.

Raportoj el Japanio. *Aprilo 1991 — Aŭgusto 1997.* HORI Jasuo (1941). Tokio: Libroteko Tokio, 1997. 205p. ISBN 4 947728 18 3. 21cm. Kun fotoj. Mallongaj raportoj pri diversaj aspektoj de la japana vivo. 30,00 gld.

Senĉesa rakonto, La (1979). Michael Ende. Ilustris Ulrike Diestel. El la germana trad. Wolfram Diestel. Berlin/Maribor: Germana E-Asocio/Inter-Kulturo, 1997. 366p. ISBN 961 6075 18 7. 21cm. Bind. "Kulta" romano de la lastaj du jardekoj: knabo neatendite ekvivas en la mondo de legata libro, kiu montriĝas pli vera ol la mondo reala. 42,00 gld.

Teksto de publikaj prelegoj okaze de la 2-a simpozio pri rilathistorio inter Japanio kaj Koreio. — 97.08.30, Koobe, Japanio. Esperanto-grupo por komuna lernolibro pri historio, 1997. 59p. 30cm. Po du prelegoj en Esperanto, la korea kaj la japana. (Vd. ankaŭ artikolon: nov. '97, p. 187.) 15,00 gld.

Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. Red. Ulrich Becker. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 1997. 54p. 30cm. Germanlingva. Aktoj de la 6-a konferenco de Societo pri Interlingvistiko (GIL), pri terminologi-sciencaj aspektoj de interlingvistiko. 18,90 gld.

Vortaro ĉeĥa-Esperanta. Česko-esperantský slovník. Karel Kraft (1926). Dobřichovice: Kava-Pech, 1998. 495p. ISBN 80 85853 37 X. 17cm. Kun 23 566 kapvortoj kaj 220 472 vortoj. 24,00 gld.

DIVERSAĴO

Vidbendo: Letero el Universala Kongreso de Esperanto, La. Bratislava: Garant, 1996. VHS. 42min. Fragmentaj impresoj pri la 81-a UK (Prago, 1996) en teknike interesa, moderna video-stilo. 45,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% por la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Monumenta ĉampiono

En la pasinta jaro Hugo Röllinger ĉampionis en nia libromerkato. Lia *Monumente pri Esperanto*, verko pri Zamenhof/Esperanto-objektoj, venkis kun nekutime granda marĝeno ĉiujn aliajn librojn same ĉe totalaj kiel ĉe unuekzempleraj vendoj de la Libroservo de UEA.

La vendonombro de la ZEO-libro estas des pli admirinda ĉar ĝi eniris la merkaton nur en aprilo. Viglan starton spertis ankaŭ du aliaj novaj titoloj de UEA, la prozaĵaro *Pajleroj kaj stoploj* de William Auld kaj la Unesko-libro *Kulturo kaj teknologio*, ambaŭ vendataj nur ekde novembro. La kajero kun la prelegoj de la Adelajda Internacia Kongresa Universitato okupis eĉ pli imponan lokon inter la dudek plej debitaj verkoj, sed ĝia eldonkvanto montriĝis tro malgranda.

William Auld estas la aŭtoro kun la plej multaj furoraĵoj, po tri en ambaŭ listoj. Krome liaj tradukoj de la Tolkienaj *La du turegoj* kaj *La reveno de la reĝo* tuŝis la sojlon ĉe la unuopaj vendoj (respektive 29 kaj 28).



La libro de Röllinger mem fariĝis ZEO.

Pli ol antaŭe elstaras titoloj de UEA kaj de tiuj eldonistoj kiuj reklamas en tiu ĉi revuo kaj en aliaj eldonaĵoj de UEA, aŭ kiuj liveras siajn produktojn al la Libroservo de UEA kun aparte favoraj kondiĉoj. UEA reciprokas tion per rekomendado de iliaj varoj i.a. en la vendokampanjoj direktitaj al klientoj en la plej aĉetpovaj landoj. Sekve ĉi tiuj eldonaĵoj ĝuas pli grandan debiton ol la varoj de pasivaj eldonistoj.

Krom reklamado, eldonistoj devus pli zorgi pri la aspekto de siaj libroj. Pli-malpli ĉiuj ĉi-subaj furoraĵoj ja estas tre allogaj grafike. Ekz. *Saluton!* vendiĝis duoble pli bone ol en la antaŭa jaro, dank' al la gaja kolora kovrilo de ĝia nova, jam sesa eldono. Sume la vendoj superis la buĝeton (260 000 gld.) je kelkdek guldenoj. Tio estis 17 000 gld. malpli ol en 1996 pro la malgrandeco, ja antaŭvidita, de la UK-libroservo (30 000 gld. anstataŭ 80 000 en 1996).

ob

VENDOJ ENTUTE

644	<i>Monumente pri Esperanto</i> , H. Röllinger	18,00 gld.
399	<i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i> , Gosciny/Uderzo	19,80 gld.
343	<i>Saluton!</i> , lernolibro de A. Childs-Mee	24,00 gld.
209	<i>Diccionario de bolsillo Esperanto-Español</i> , poŝvortaro de J. Paluzie-Borrell	13,50 gld.
165	<i>Saluton!</i> (kasedo al la lernolibro)	12,00 gld.
159	<i>La fenomeno Esperanto</i> , W. Auld	18,00 gld.
134	<i>Pajleroj kaj stoploj</i> , W. Auld	42,00 gld.
121	<i>Kulturo kaj teknologio</i> , A.O. Urevbu	15,00 gld.
118	<i>Esperanto</i> , muzika kompaktdisko	37,80 gld.
114	<i>Internacia Kongresa Universitato</i> , kompleta prelegaro 1997	15,00 gld. (elĉerpita)
101	<i>Winnie-la-Pu</i> , A.A. Milne	27,00 gld.
98	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton	36,00 gld.
98	<i>Gerda malaperis!</i> , C. Piron	13,80 gld.
95	<i>Nova Esperanta krestomatio</i> , red. W. Auld	42,00 gld.
94	<i>Asteriks kaj Kleopatra</i> , Gosciny/Uderzo	19,80 gld.
91	<i>Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI</i> , gvidilo	4,80 gld. (elĉ.)
91	<i>Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo</i> , T. Sekelj	15,00 gld.
90	<i>Franz Schubert – Muzika albumo</i> , E. A. Ekker / D. Eisenburger	30,00 gld.
84	<i>Esperanto for beginners</i> , M.C. Butler	2,70 gld.
81	<i>Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo</i> , A. Cherpillod	15,00 gld.

UNUOPAJ VENDOJ

120	<i>Monumente pri Esperanto</i> , H. Röllinger	18,00 gld.
71	<i>Esperanta antologio</i> , red. W. Auld	27,00 gld.
64	<i>Saluton!</i> , lernolibro de A. Childs-Mee	24,00 gld.
60	<i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i> , Gosciny/Uderzo	19,80 gld.
58	<i>Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo</i> , A. Cherpillod	15,00 gld.
55	<i>Pajleroj kaj stoploj</i> , W. Auld	42,00 gld.
53	<i>Esperanto</i> , muzika kompaktdisko	37,80 gld.
52	<i>Nova Esperanta krestomatio</i> , red. W. Auld	42,00 gld.
42	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , M. Boulton	36,00 gld.
42	<i>Taglibro de Anne Frank</i>	42,00 gld.
41	<i>Kulturo kaj teknologio</i> , A.O. Urevbu	15,00 gld.
40	<i>La bildstria gvido al genetiko</i> , L. Gonick-M. Wheelis	27,00 gld.
39	<i>La danĝera lingvo</i> , U. Lins	66,00 gld.
38	<i>Saluton!</i> (kasedo al la lernolibro)	12,00 gld.
35	<i>Fundamento de Esperanto</i> , L.L. Zamenhof	27,00 gld.
34	<i>La serĉado de la perfekta lingvo</i> , U. Eco	36,00 gld.
33	<i>Falantaj muroj</i> , T. Steele	24,00 gld.
31	<i>Viktimoj</i> , J. Baghy	27,00 gld.
30	<i>La bona lingvo</i> , C. Piron	19,80 gld.
30	<i>...kun siaspeca spico!</i> , R. Schwartz	33,60 gld.
30	<i>La manto</i> , P. Mährti	39,60 gld.
30	<i>Senĝenaj dialogoj</i> , A. Fernández	18,00 gld.

Ĝustigo

La ĝisdatigita "Baza legolisto de originala Esperanta literaturo" de William Auld (jan., p. 16) unue aperis ne *La Brita Esperantisto*, kiel ni indikis, sed en *La Gazeto* (n-ro 70, 30 apr. '97, p. 31), kiu lin invitis por tiu tasko.

Ankaŭ mi volas

aboni en 1998 al

EVENTOJ!

Baza kotizo: 74 NLG, aerpoŝte: 86 NLG



• Gajnu 500 gld. dank' al ŝtelo

“En la nokto de la 5-a al la 6-a de sept. 1997 nekonataj personoj eniris perforte en unu el niaj lokaloj [...] Ili perfortis la pordon, eligis ĉiujn meblojn kaj arkivaĵojn [...] kaj masonis la enirejon. Plendo kontraŭ nekonato estis farita ĉe la justicpolico.” Jena (ne fikcia!) komuniko de SAT formu la elirpunkton de detektiva romano, sendota ĝis 30 jun. al unu el la du eldonejoj Fonto (G.A. Bays, C.P. 49, BR-89801-970 Chapecó – SC, Brazilo) kaj Iltis (I. Haupenthal, Schulstr. 30, DE-66133 Scheidt, Germanio), kiuj kune eldonos kaj — se la polico ne klarigos la aferon ĝis tiu dato! — per 500 gld. premios la plej bonan konkursaĵon, ampleksan je min. 100 presitaj paĝoj.

• Pola Stelo sur la horizonto

Oni planas lanĉi songazeton en Esperanto, *Pola Stelo*, pri temoj E-movadaj, polaj (ĉefe kulturaj) kaj (malmulte) blindulaj. En ĉiu numero troviĝos intervjuoj el la E-elsendoj de Pola

La populara socia kaj kultura revuo de TEJO, la dumonata *Kontakto* estas ekde januaro redaktata, presata kaj eĉ dissendata en Bulgario. Pri ĉio tio zorgas ĝia nova redaktoro, d-rino Sabira Ståhlberg. Origina el Finnlando, sed loĝinta kaj studinta en diversaj landoj, ĉi tiu 28-jara fakulino pri Azio aktivis en TEJO (eĉ kiel vicprezidanto), vojaĝis kaj verkis, i.a. la libron *Malantaŭ la muro — puzleroj pri Ĉinio*, studojn kaj artikolojn en *Literatura Foiro*, *Kontakto* kaj aliaj revuoj, interalie la nia. Ĉerpinte dum pluraj



Foto: Parquale Zappelli

semajnoj — ĉeeste kaj telekomunike — la redaktorajn spertojn kaj materialojn de Franĉjo Veuthey, kiu estris *Kontakto* dum la lastaj ses jaroj, Ståhlberg jam produktis sian numeron 1998/1, en rapida sekvo al la adiaŭa numero de Veuthey (kiu restos en la Centra Oficejo kiel redaktoro de la Jarlibro kaj kun novaj taskoj). La redakcia adreso de *Kontakto* nun estas: p.k. 405, BG-9000 Varna, Bulgario. (Pri abonoj, anoncoj kaj aliaj administraĵoj plu respondecas la CO de UEA.)

Unuaj Thorsen-apogoj al bibliotekoj

Ĉe la unua aljuĝo, Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen montriĝis vere bezonata iniciato. Ĝis la limdato UEA ricevis entute 21 subvenci-petojn. La ĵurianoj Renée Triolle (estrano pri kulturo) kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller, asistataj de libroservisto Simo Milojević, havis malfacilan taskon decidi pri la divido de la disponebla sumo, kiu en tiu ĉi unua jaro estis 3500 gld. Pli-malpli ĉiuj petintoj meritis helpon, sed tio igus la subvenciojn tro malgrandaj.

Ĉe la elekto de subvencioj oni decidis ne konsideri ĉi-foje petojn de privataj personoj nek de lastatempaj ricevintoj de subvencio aŭ monpremio de UEA aŭ de fondaĵo de UEA. Ankaŭ bibliotekoj fonditaj nur lastatempe restis sen subvencio. Oni konsideris ankaŭ aliajn aspektojn, kiel ekz. nombron de uzantoj. Sekve rezultis jena decido pri la subvencioj en 1997:

Hispanio: <i>Hispana Esperanto-Muzeo</i>	600 gld.
Hungario: <i>Esperanto-Kolektaĵo Fajski</i>	500 gld.
Ĉeĥio: <i>Esperanto-Klubo en Brno</i>	400 gld.
Irano: <i>Irana Esperanto-Junularo</i>	400 gld.
Rusio: <i>Kolektiva Esperanta Biblioteko</i> (Jekaterinburg)	400 gld.
<i>Krasnojarska Esperantista Klubo</i>	400 gld.
Srilanko: <i>Esperanto-Centro de Ja-Ela</i>	400 gld.
Ĉinio: <i>Donghu-a Esperanto-Domo</i>	200 gld.
Italio: <i>Triesta Esperanto-Asocio</i>	200 gld.

La sekva limdato por subvenci-petoj estos la 15-a de oktobro. En 1998 la disponebla sumo kreskos al ĉ. 4000 gld., ĉar uzeblis unuafoje ankaŭ la rento de la kapitalo.

Radio, sed ankaŭ intervjuoj ekskluzivaj, kaj sonmaterialoj pri E-arangoj. Jarabono de la sonrevuo, dissendota 4 fojojn jare, po 2 kasedoj de 90 min., laŭplane egalos al 28 usonaj dolaroj (+ sendokostoj). *La plano realigos se kolektiĝos almenaŭ 150 abonantoj.*

Se la revuo kontentige funkcios dum jaro, ĝi daŭros, alie ĉesos plenuminte la unujarajn abonojn. Antaŭmendoj: Pola Radio, E-Redakcio, pf. 46, PL-00-977 Varsovio, Pollando; ☎+48/22/645-59-17; ✉pettyn@radio.com.pl.

• La Eta Gazeto ĉesas aperi

Post la forpaso de Aldo Viotto (dec. '97, p. 218), Triesta E-Asocio decidis ne plu eldoni sian valoran bultenon *La Eta Gazeto*. El la adiaŭa numero (dec. '97): “Produkti informilon” kun “artikoloj pri jam velkintaj okazaĵoj, kiu aperu pli-malpli nekonstante, ne interesas nin. Tiaj periodaĵoj — foje eĉ luksaj — abundas en nia movado, ne multon utilas kaj nenion novan diras [...] certe oni ne bezonas unu plian.”



• Akademio: Triona renoviĝo

En ĉiu tria jaro la membroj de Akademio de Esperanto voĉdonas pri la renovigo de triono (15) el la 45 akademiaj mandatis. Ĉi-foje 28 personoj kandidatis por 17 lokoj (du kromaj lokoj iĝis vakaj pro forpasoj). La balotado estis daŭranta post nia redakto-fino, ĝis la 28-a de februaro. La nova estraro estos elektita de la (parte) nova membraro antaŭ la fino de junio.

• Bibliotekoj: Kortrijk pli bone fartas

Antaŭ jaro ni raportis (marto '97, p. 42) pri problemoj de la Esperanta kolekto (po dekmilo da libroj kaj da revuaj jarkolektoj) en la urba biblioteko de Kortrijk (Belgio). De tiam la situacio iĝis pli esperdona: la ordigo estas grandparte farita, anoncis sin kelkaj volontuloj, kaj atendeblas iom da financaj rimedoj. Ĉefbibliotekisto Vancolen estas entuziasma pri la nova aktivado ĉe la E-kolekto kaj promesis kunlaboron, ekz. por organizi vizitojn al Esperanto-Fondaĵo Kortrijk kaj ekspoziciojn pri ĝi. La biblioteko baldaŭ transiros al la kataloga sistemo ĝenerala en Flandrio (kongrua kun internaciaj principoj): eblos integri en tion ankaŭ la Esperanto-kolekton.

La ĉefa respondeculo ekde nun estas Hugo Rau (Volkegemberg 58A, BE-9700 Oudenaarde, Belgio; ☎+32/55/312-703). Kiel ĝis nun, la kolekto estos vizitebla dum la unua ĵaŭdo de la monato. Mankolisto de revuoj estas disponebla. (R. Rotsaert)

Belartaj Konkursoj de UEA en 1998

Restas ankoraŭ kelkaj tagoj ĝis la limdato (31 marto) de Belartaj Konkursoj! Sendu do rapide viajn verkojn en kiu ajn ĝenro konkursa al la CO. Detalojn legu en nov. '97, p. 194, aŭ petu de la CO.

• Komputado: UVERT, PlanetAll

Kun la Munkena E-junularo, Reinhardt Wiewe (☐fenrislupo@aol.com) iniciatas Unuan Virtualan E-Renkontiĝon Tutretan (UVERT) inter la 22-a kaj la 29-a de marto, samtempe kun sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj en Moskvo. Informojn pri tiu "aŭtonoma, malferma, malorganizata, tolerema renkontiĝo" vi trovas ĉe <http://www.esperanto.net/uvert>.

Trovinde "promesplenan formon de organizado" ĉe la senpaga servo <http://www.planetall.com>, Wiewe ankaŭ kreis tie centon da Esperantaj ret-grupoj, kies listo videblas ĉe <http://members.aol.com/fenrislupo/pub/adresaroj/planetall/planetall01.html>.

• Scienco: Danuba Forumo

La Budapeŝta Universitato ELTE, konata pro sia Esperanto-fako, gastigos la Duan Danuban Esperantistan Sciencan kaj Kulturen Forumon (25-26 majo), kiu pritraktos, en la laborlingvoj Esperanto kaj germana, temojn lige al la rivero Danubo, el la perspektivoj de diversaj natur- kaj homsciencoj. Anoncoj de ĉ. 20-minutaj prelegoj estas bonvenaj ĝis 31 marto, resumoj devas alveni ĝis 15 aprilo. La Lokan Organizan Komitaton prezidas prof. Endre Dudich. Informoj: Hungaria Esperanto-Asocio (Pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario; ☎+36/1/268-03-06; 📠268-0331; ☐esperanto-hea@mail.c3.hu). ("Interredaktore")



Filmo: La eta knabino

La eta knabino aŭ kiel oni trovas ian helpon: la Esperante parolanta filmeto (6 min.) de la svisa reĝisoro Samir (vd. okt. '97, p. 170) videblis en pluraj festivaloj (i.a. Rotterdamo), kaj ricevis la svisan nacian premion por kurtfilmoj. *La eta knabino* mesaĝas "solidarecon de malsamaj estaĵoj". (D. Weidmann)

• Interlingvistiko: Dissendo-listo

Kreigiĝis reta dissendo-listo por la studado de ensociiĝintaj planlingvoj — t.e. funkciantaj lingvoj kreitaj por interkultura komunikado surbaze de konkreta projekto. BJA-LISTO akceptas kontribuojn el larĝa tem-gamo, sed nepre ne celas pridiskuton de planlingvaj projektoj sen parolkomunumo, nek de reformoj en Esperanto (t.e. aprioraj ŝanĝoj en ĝia baza regularo). Por aliĝi, sendu al ☐Majordomo@Helsinki.Fi la mesaĝon "subscribe bja-listo via@kompleta.adreso" (sen citiloj). Administras la liston Jouko Lindstedt (☐Jouko.Lindstedt@Helsinki.Fi). Hejmpaĝo: <http://infoweb.magi.com/~mfettes/bja-listo.html>

• Muziko: Centmilopa Solo

En la kompakt-disko kiu akompanis en oktobro la hispanan muzikan revuon *Future Music* (pli ol 100 mil ekzempleroj), aŭdeblas E-lingva kanzono de la e-ista kantisto Solo (pseudonimo de Eduardo Vargas). (*Boletín*)

• Universitatoj: Studu en Pollando

Universitato Adam Mickiewicz en Poznań anoncas 3-jaran eksteran studadon post-diploman pri interlingvistiko. La unua studjaro startos en la vintra semestro de 1998/99 kaj la ciklo rekomenciĝos ĉiun trian jaron. La kurso okazos sub la gvido de d-rino Ilona Koutny, kun subteno de prof. Tadeusz Zgółka. Inter la prelegontoj estas konataj esperantologoj, kiel prof. M. Duc Goninaz, H. Tonkin, T. Tyblewski kaj J. Wells, d-rinoj K. Smidéliusz kaj V. Barandovská-Frank.

Aliĝo: ĝis la 10-a de aŭgusto 1998. Postulo: finitaj studoj en mezgrada lernejo kaj bona scio de Esperanto. Kotizo por unu semestro: 400 USD (por nepagipovaj landoj ĉ. 80 USD).

Pli ampleksajn informojn vi trovos en nia revuo (majo '97, p. 86; jul.-aŭg. '97, p. 128) kaj povas peti de d-rino Koutny: Lingvistika Instituto, UAM, ul. Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; ☎/📠+48/61/861-85-72; ☐ikoutny@hum.amu.edu.pl.



culoj [en Bilbao] mon-avide persekutas la gluadon de afiŝoj en la stratoj, kaj tio malfaciligas la kaptadon de komencantoj. Fakte nia grupo estis monpunita, sed ni ne atentis pri tio, ĉar multaj asocioj troviĝas en la sama situacio. Nun la puno kreskis tiel ke ni ŝuldas pli

ol 100 000 pesetojn (ĉirkaŭ 1300 gld.). Kaj la ŝuldo kreskas ĉiutage!" (*Boletín*)

Dank' al ekonomie bona funkciado, Grupo Esperanto de Valencio aĉetis propran sidejon (80 m²) en favore situanta strato. (*La Ondo de Esperanto*)

• Bosnio-Katalunio: *Spite al ĉio*

Zamenhof-tage, ĉe la Unesko-klubo Barcelona publike prezentigis la revuo *Bosnia Lilio* kaj la libro *Spite al ĉio*, *Bosnio*, eldonitaj de Kataluna Esperanto-Asocio kadre de ĝia kunlabora programo (vd. apr. '96, p. 67) kun Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. (L. Puig)

• Britio: Asocia ejo vendota?

Pro la financa stato de Esperanto-Asocio de Britio, ties administra komitato pritraktas la ideon vendi la Esperanto-centron ĉe 140 Holland Park Avenue en Londono kaj translokiĝi al malpli kosta loko, prefere proksima kaj simile granda. Pluaj diskutoj pri la ŝanĝo de lokalo okazos en la 82-a Brita Esperanto-Kongreso (10-13 apr., Chester). (*La Brita Esperantisto*)

• Hispanio: Kosta afiŝo

Laŭ raporto de la Esperanto-grupo de Bilbao, "la urbaj responde-



Foto: Janc

• Ĉinio: *Johano la Brava* en freŝa traduko

Dum la Tutlanda Konferenco de Esperanta Kulturo (11-14 dec., Conghua) Hu Guozhu, vicprezidanto de Hubei-a E-Asocio, prezente levas eldonaĵon de sia asocio: novan, dulingvan *Johano la Brava*. La Kaloĉajan tradukon de la hungara fabel-poemo paralele akompanas nova ĉinigo fare de Li Naixi. (Jariĉ)

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: Philippe De Vos. Japanio: TANAKA Kazuo.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Aŭstralio: Owen Loneragan. Germanio: Heinrich Nischwitz. Usono: R. Paul Lynch; Ronald J. Glossop. AMIKOJ (minimуме \$10): Aŭstralio: Max Wearing; Stan J. Bruton. Usono: Dorothy Holland; D. Gary Grady.

PATRONOJ DE TEJO 1998

Belgio: José A. Pinto de Sousa. Britio: Martyn Hugh McClelland. Finnlando: Albin Backholm; Päävi Saarinen; Seija Kettunen. Francio: Évelyne Boilau; Michel Cavelan; Denis-Serge Clopeau; Gaston Fournier; Jean-François Clet; Hervé Mougin; Pierrette Pialla; Raymond Despujols. Germanio: Franz Knöferl; Gisela Macioszek. Italio: Lidia Neri Lami; Gianfranco Pole-rani. Japanio: Kazuyuki Hosomi; Takasi Kawai; Kōiti Simizu. Kanado: Stevens T. Norvell Jr. Litovio: Paul K. Jegorovas. Nederlando: F.J. Pieterse-Kruger. Usono: E. Williger; D. Gary Grady; R. Paul Lynch.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Aŭstralio: Stan J. Bruton. Belgio: André Mertens Goossens; Michael Cwik; Luc Duchateau; José A. Pinto de Sousa; Peter Weide. Britio: Sybil V. Sly; John C. Wells. Finnlando: Raita Pyhälä. Francio: Jean Amoureux; Blaise Berthonneau; Eloi Thiollère; Pierre Métivier; Julien Ducrocq; Jean-Louis Texier. Germanio: Elfriede Blasius; Gisela Macioszek; Heinrich Nischwitz; Helmut Welger; Helmut Klünder. Hispanio: Josep Frances Solé; Luís E. Hernández; Rafaela Uru-eña. Italio: Clara Gubbioli Carioli; F. Borromei Mascarucci; Lidia Neri Lami. Japanio: Kazuyuki Hosomi; Ken'iti Matumoto; ŌSAKI Kazuo; Kōiti Simizu; Takeo Sugano; YAMASAKI Seikō. Kanado: Bruce R. Crisp; Stevens T. Norvell Jr. Litovio: Paul Jegorovas. Nederlando: G.F. Makink; J. Calado; J. W. Moonen; S.P. Smits; W.C. Keizer; Willy Keizer. Norvegio: Olav Bjørnsrud. Portugalio: João A. Frazão de Faria. Svedio: Sten A. Broman; Martin Häggström; Harald Andersson; Lennart Svensson; Leif Holmlund; Nils Gustav Johansson; Tore Johansson. Svislando: David Cohen; S. Kaufmann. Usono:

Bruce A. Sherwood; D. Gary Grady; R. Paul Lynch. Venezuelo: Juan E. Bachrich.

DONACOJ 1998 (NLG)

ĝis la 31-a de januaro

Fondaĵo Afriko: Italio: D. Trombetta 2403,30.

Sumo ĉi-jara 2403,30.

Fondaĵo Ameriko: Svislando: L. Orтели 30,14; D. Pochanke 13,70. Sumo ĉi-jara 43,84.

Fondaĵo Canuto: Germanio: W. Foag 9,01. Italio: L. Oberrauch 5,00. Nederlando: F. Zeiler 103,00. Sumo ĉi-jara 117,01.

Ĝenerala Kaso: Portugalio: W.T. Oeste 6,61. Ruslando: D. Unu 11,21. Usono: D.C. Halley 200,00. Usono: D.B. Holland 40,00. Sumo ĉi-jara 257,82.


Fondaĵo Grabowski: Usono: H.V. Janoski 200,00. Sumo ĉi-jara 200,00.

Junulara Fondaĵo: Germanio: B. Maurer 110,00. Sumo ĉi-jara 110,00.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: J.P. Punt 89,00. Norvegio: J.P. Hoff 10,00. Sumo ĉi-jara 99,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.

Sensalajraj ukrainoj malhavas vivnecesaĵojn, medikamentojn, hejtadon ĉe -25 gradoj. Helpu pere de E-klubo Verda Radio (Elena 12, UA-315610 Pirjatin, Ukrainio), uzante la UEA-konton "jajt-s" de Jacques Tuinder.

Ilustrita vortaro pri heroldiko, de Nikolaj Starodubcev, kun 1005 terminoj en sep lingvoj (angla, Esperanta, franca, germana, latina, rusa, ukraina), 345 p., bind., 39 gld. ĉe la Libro-servo de UEA. Vidu krome: <http://www.library.donetsk.ua/English/commerce/3.html>.

Knabo mezaĝa laŭ PIV-a difino n-ro 3 serĉas korespondamikinon edziĝcele. Loĝas en Svisio. Treege vojaĝema, ĉiamulo, sportema multifaceta personeco. Mi estos la princo de viaj revoj — sed palacon ne posedas. Skribu al la redakcio, laŭ kodo "Knabo mezaĝa".

Akademio kiu preparas inĝenierojn pri agrikultur-maŝina industrio, ekologia kaj laborproceza sendanĝereco de produktado, manaĝado, serĉas kontaktojn kun superaj lernejoj tutmonde por komunaj projektoj, interŝanĝoj de studentoj kaj instruistoj ktp. Kontakt-adreso: d-ro A. Melnikov, p.k. 393, RU-34407 Rostov-na-Donu-7, Rusio.

Rezulton de 40-jara laboro ofertas Eldonejo Jan Wacław Pióro (Reja 15/19, PL-05-820 Piastów, Pollando): *Enciklopedio de kemia nomenklatur* (Kemia internacia vortaro; Nomoj de acidoj; Kemiaj elementoj; Logiko en kemia nomenklatur; Semiotiko; Kiu malkovris oksigenion?; Reforma polskiej nomenklatury chemicznej).

Komencanto — utila kaj agrabla gazeto por komencantaj esperantistoj, komencantaj aŭtoroj kaj kursgvidantoj el la tuta mondo. 20 korespondadresoj ĉiunumere. RU-620041, Jekaterinburg-41, poŝtkesto 132, Ruslando.

Al entuziasmaj E-lernantoj 14-jaraj sendu poŝtkarton en facila Esperanto: p/a Ralph Craig, Hale High School, 3400 White Oak Rd., Raleigh, NC 27609, Usono.

Esperanto-bildkartojn kolorriĉajn el Koreio kontraŭ viaj Esperanto-libroj. Turnu vin al Seula Esperanto-Kulturcentro. Retpoŝto: esperant@unitel.co.kr aŭ fakso: 82-2-756-4859.

Simple por komuniki, skribu al 40-jara fajrobrigadano el urbeto Artiom ĉe Vladivostoko, interesata de fotado kaj komputiloj: Sergej Belickij, ryder@mail.primorye.ru.

NEKROLOGOJ

Dragutin BALAGOVIĆ (1933-1997), Zagreba ĵurnalisto, mortis la 16-an de decembro. Dum kvar jardekoj da E-agado li plurfoje prezidis la Zagreban E-societon Bude Borjan kaj kunlaboris per Esperanto kun alilandaj gazetoj.

René CENTASSI (1922-1998), franca ĵurnalisto, eksa ĉefredaktoro de la granda informagentejo AFP, mortis la 10-an de januaro en Parizo. Ekinteresi pri Esperanto en siaj lastaj vivjaroj, kun Henri Masson li verkis la Zamenhof-biografion *L'homme qui a défié Babel* (1995, "La viro kiu defiis Babelon"; vd. jul.-aŭg. '97, p. 134), aperontan ankaŭ en E-traduko.

René Centassi



Walter MUDRAK (1904-1998) mortis la 31-an de januaro en Vieno. Esperantisto de 1921, li aktivis dum pli ol 70 jaroj en Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kies 27-an kongreson (1957) li organizis en Vieno. Li estis sekretario de Mondjunularo Katolika (fondita en 1920), afergvidanto de Aŭstria Katolika Ligo E-ista kaj de Aŭstria E-ista Federacio (1967-78), kaj estrarano de Aŭstria E-Asocio. Li gvidis kursojn, kunlaboris en diversaj revuoj kaj en *Enciklopedio de Esperanto* (1933). Membro de UEA 50 jarojn, Mudrak estis LKK-vicprezidanto de la 55-a UK (1970) en Vieno.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-765-0880 [h], +82-53-652-4488 [of]; ✉ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ✉ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mcclin.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ✉ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Komitato de UEA: Jarlibro 1997 enhavas liston de ĉiuj komitatanoj (vd. p. 15-19).

SCIENCA REVUO, oficiala organo de
INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (ISAE)
Kajero n-ro 172, Volumo 48 (3), 1997

ENHAVO

ESPERANTO KIEL FAKLINGVO – ELEKTA BIBLIOGRAFIO <i>Detlev Blanke (DE)</i>	3
EVENTUALAJ REFORMOJ DE LA SKRIBO DE ESPERANTO <i>Yannic Gicquel (FR)</i>	15
KINETIKO DE KRISTALIZADO DE INSULINO EN LA FORMULADO DE INJEKCIAĴOJ POR UZO TERAPEŬTIKA <i>Arturo Toledo kaj aliaj (CU)</i>	30
CINETIKA DE KRISTALIZACION DE INSULINA EN LA FORMULACION DE INYECTABLES PARA USO TERAPEUTICO <i>Arturo Toledo kaj aliaj (CU)</i>	40

Internacilingva Sciencia Asocio

ISAE-Sekretario R. Hauger, Ringstr. 13, CH-8172 Niederglatt, Svisio
Jarkotizo 30,— CHF, Poŝtĉekonto 80-5909-0 "ISAE", Zŭrich



En 1997 242 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en
UK kaj donaceton kun la Jarlibro,
kiu en 1997 estis bela SZ-ŝlosilujo.
La kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.



Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas
kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



UEA reeldonis la bazan
gvidilon por instruantoj
de la internacia lingvo:

metodiko de la esperanto- instruado

de Rudolf Rakuŝa (1893-1970)
Temas pri 3-a eldono de la verko
unue aperinta en 1957 kaj
kompletigita en 1970. 189p.
20cm. ISBN 92 9017 045 X.

Prezo: 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.
Havebla de la Libroservo de UEA.



HAVEBLA BELA FLAGO ESPERANTA

Ĝis nun oni proponis nur flagetojn. Nun finfine estas mendeblaj
ankaŭ belaj **grandaj flagoj** en la formato 100x150 cm, el
centprocenta nilono, kun ligŝnuro, kun koloroj permesantaj
normalan lavadon. **Prezo** inkl. sendokostojn: 2000 BEF. **Eldonis:**
KARILJONO, p/a De Schepper, Postbus 47, BE-2650 DEGEN, Belgio;
GSM: 075 475965; ✉ Esperanto@skynet.be. Ni volonte
akceptas la kreditkartojn VISA, EUROCARD, ACCES, DINERS CLUB,
AMERICAN EXPRESS. Ni ankaŭ vendas flagojn de landoj ktp.

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas
la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO *tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

RIKOLTO DE 50 JAROJ

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj.
William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p.
ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en
Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindekda
miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia
biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe
pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. —
Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne
havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto.
Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da
librorecenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al
tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la
rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora
laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj,
Tradukoj, Libro-kulturo. Juvelo de la eldona rikolto ĉi-jara!


william auld

pajleroj

kaj stoploj

elektitaj prozaĵoj

universala esperanto-asocio



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto
tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994
(2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Cent jaroj (1896-1996) da
stratoj, placoj, monumentoj,
bustoj, kulturcentroj,
tabuloj, parkoj, pontoj,
asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam:
UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabe-
loj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo:
18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Tuta biblioteko en unu libro!



El ĉiuj aperintaj volumoj en la Jubilea Kolekto
de UEA, tiu ĉi – la kvina – plej bone prezentas
la tutan lingvon, ĝiajn varion kaj fascinon.

Nova Esperanta Krestomatio

Redaktis William Auld.

509 p. Tole bindita kun kromkovrilo.
42,00 gld.; nur 28,00 gld. ekde 3 ekzempleroj.

Fondaĵo Canuto

*Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpas
nin teni la kontaktojn kun tiuj,
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!*

La Kosmologio de Martinus

- estas spirita scienco pri eternaj principoj kaj strukturoj de la vivo
- donas grandan perspektivon pri la intelekta kaj humana evoluo de besto al vera homo
- kreos per studado kaj praktikado pacon en la homo
- unuigas kun la materia scienco kaj kontribuas al kreado de internacia mondregno – kaj paco

Kosmologi-kursoj en Danio
9a-22a de aŭgusto 1998

Petu informon kaj senkoston numeron de la revuo KOSMOS.

Martinus-Instituto

Mariendalsvej 96, DK-2000 Kopenhago F, Danio.

☎: +45 3834 6280 Fakso: +45 3834 6180 Reto: martinus@centrum.dk

Nenia unuiĝo aŭ membreco

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

Andrew O. Urevbu

Kulturo kaj teknologio



UEA

INTERESKAPTA LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Studo pri la jara temo
por 1997 de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo.
Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam:
UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.



Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologian evoluon? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologian ŝanĝon? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.